

marto 1973

66-a jaro

n-ro 807 (3)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



La trajtoj de Jugoslavio

sur la paĝoj 44-45 kaj 55 novan inviton al la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto. Ĝus aperis la Oficiala Bulteno (dua) kun priskribo de loĝkategorioj, ekskursoj kaj Oficiala Postkongreso en Ateno. La aliĝantoj povas do tuj fari sian elekton kaj certigi al si, ke ili ne maltrafos ion pro malfrua mendo. Cetere, kiu kutimas kompare pristudi la statistikojn pri la kongres-aliĝoj (vidu sur la paĝo 55), tiu certe rimarkis tre kuraĝigan efikon de niaj ekster-eŭropaj Universalaj Kongresoj. Post la 50-a UK en Japanujo, la nombro de japanaj aliĝantoj al la postaj Universalaj Kongresoj en eŭropaj landoj kreskis preskaŭ sensacie. Ŝajnas, ke same entuziasmege efikis ĉe la usonaj esperantistoj la pasintjara UK en Portland: ĝis la 28a de februaro jam aliĝis 82 usonanoj, por ne paroli pri la 16 kanadanoj. Salutinde!

Enhavo

- 41 Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko (Sadler)
- 42 Parizo purigas la francan lingvon de anglaj vortoj
- 42 Grupo de parlamentanoj
- 42 Filatela precedenco
- 43 Zagreb jubileas
- 43 Jarlibro pri mondaj problemoj
- 43 Poezia bataalkampo
- 43 Nova universitata kurso
- 44 Ĉe la kunfluejo de oriento kaj okcidento (Huber)
- 46 Leviĝanta problemoj ĉirkaŭ EEK
- 46 Al la Tria Laborplano (Kurucz)
- 47 Eŭropa Esperanta Kongreso – Pentekosto, 1973
- 48 Informoj de CED
- 49 Ĉu vi kapablas instrui Esperanton je supera nivelo?
- 50 Loke – Fake – Persone (novaĵoj mallongaj)
- 52 Recenzoj
- 54 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 55 58a Universala Kongreso: Oficiala Komunikado
- 56 TEJO-paĝo
- 57 Fekunda tereno – la skoltaro
- 57 Ekzempla enketo
- 57 Renkontiĝo por infanoj
- 58 Komenco bona – ĉio bona (por komencantoj)
- 59 Oficiala informilo n-ro 465
- 60 Anoncetoj

La kovrilo

Publikigante en ĉi tiu numero artikolon pri la ĉi-jara kongresa lando, ni provas resumi per unu bildo kelkajn trajtojn de ĝia popolo. Kvankam temas pri plurnacia ŝtato, tamen la parencaj tradicioj, ĉiutagaj interkontaktoj kaj la samŝtataneco mem permesas paroli pri tutlanda karaktero. Ĉu ni estas tro aŭdacaj, kredante legi sur la trajtoj de tiu ĉi virino el Posavina (Kroatujo) iom el ŝia propra karaktero kaj el la karaktero de ŝia popolo?

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). Ĉefredaktoro: V. Sadler. Redaktorino: A. Woessink-Nagata. Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo). Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza Afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld. Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando. Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA). Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA. Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo. Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo. Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo. Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando. Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo. Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko

En la venonta 58a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd, Jugoslavio, Universala Esperanto-Asocio faros novan, kuraĝan paŝon en sia sistema pritrakto de la monda lingvo-problemo. Kiel ĉeftemon por tiu kongreso la Estraro de UEA elektis pridiskuti "Lingvan egalrajtecon en teorio kaj praktiko".

Konsciigi la publikon

La celkonscia pritraktado de la lingva problemo fare de la organizita Esperanto-movado estas relative nova. Dum jardekoj la movado preferis emfazi la pozitivajn avantaĝojn, kiujn donas la Internacia Lingvo ekzemple al la turisto kaj komercisto. Ĝi eble ilustris per ia anekdoto la malfacilaĵojn, kiujn tiaj personoj spertas sen komuna lingvo, sed serioza pristudo de la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj apenaŭ ekzistis. Siaflanke, granda parto de la publiko neadis — kiel ankoraŭ hodiaŭ ĝi neadas — ke entute ekzistas grava problemo. Estas tipe, ke gravaj dokumentoj de Unesko kaj aliaj organizaĵoj, kiuj pritraktas internaciajn rilatojn, ofte priskribas detale la obstaklojn sociajn, psikologiajn, rasismajn aŭ nure teknikajn inter la popoloj, sed eĉ ne unu vorton diras pri la lingvaj baroj. La abunda dokumentaro de Unesko pri internacia komunikado per satelitoj, ekzemple, kaj la multegaj konferencoj pri tiu temo, detale konsideras la teknikajn, jurajn kaj politikajn problemojn sed preskaŭ komplete ignoras la lingvajn. Ĝuste tial necesas daŭre konsciigi la publikon pri la lingva ĥaoso kaj povi pruvi al la politikistoj, al gravaj organizaĵoj kaj al ĉiuj, kiuj ludas decidan rolon en la socio, la maljustecon kaj malekonomiecon de la nuna situacio. Se aliaj instancoj ne pretas pristudi en dokumentoj kaj konferencoj la lingvan problemon, tiam tiun taskon devas akcepti la Esperanto-movado mem.

Tio kompreneble ne signifas, ke ni prezentu nur la problemon kaj silentu pri ĝia solvo. Ĝi signifas, ke ni devas prezenti ambaŭ aspektojn: kaj la demandon, kaj la respondon.

Multjara evoluo de niaj studoj

La fondo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (nuntempe Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) en Londono en 1952 estis la deirpunkto por multjara evoluo en tiu direkto. Novan antaŭenpuŝon donis la kampanjo kontraŭ lingva diskriminacio okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968 kaj la Ĝenerala Kunveno de UEA en Madrid pri "Kulturaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio". Koincide kun la 20a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ekaperis en decembro 1968 la nova revuo de CED *La Monda Lingvo-Problemo*. De tiam aperis jam 11 kajeroj kun pli ol 60 studoj pri ĉiuj aspektoj de la lingvo-problemo

difinitaj en la subtitolo de la revuo: *socia, lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomika*. Estis venditaj ĝis la fino de 1972 pli ol 2 500 jarkolektoj de la revuo, grandparte al universitatoj, bibliotekoj kaj unuopaj fakuloj sur diversaj kampoj.

La temon de la Ĝenerala Kunveno en Londono en 1971 — *La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo* — daŭrigis kaj ampleksigis la seminarion en Frostavallen en 1972. (La kompletaj materialoj de Londono aperis en *La Monda Lingvo-Problemo* n-ro 9, kaj en posta numero aperos ankaŭ parto de la materialoj de Frostavallen.)

Perfekta solvo — ĉu ekzistas?

Nun sekvos, en Beograd, la diskutoj pri "Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko". Laŭ decido de la Estraro de UEA, la Kongreso pritraktos sub tiu titolo lingvajn problemojn nur *enlandajn*.

Kiam temas pri la lingva problemo en monda skalo, oni povas kuraĝe proponi Esperanton kiel solvon klaran kaj kompletan. Kiam temas pri lingvaj problemoj interne de unuopaj ŝtatoj, aliflanke, oni devas sinteni multe pli modeste kaj singarde. Ne nur pro tio, ke la enlandaj lingvaj konfliktoj estas kutime multe pli akraj, ol la internaciaj. Ne nur pro tio, ke propono pri Esperanto kiel rimedo por mildigi tiajn konfliktojn povas aspekti kiel provo anstataŭigi la naciajn lingvojn sur ilia propra hejma teritorio. Sed ankaŭ pro tio, ke sur enlanda kaj loka nivelo en multaj kazoj ne ekzistas perfektaj solvoj. Ekzemple, en tre multaj landoj de la mondo — precipe en Azio kaj Afriko — vivas tre malgrandaj popoloj, kelkfoje kun nur kelkaj centoj da anoj, kiuj tamen parolas tute apartan lingvon. Estas neimageble, almenaŭ en la antaŭvidebla estonteco, ke tiaj popoloj iam ĝuu en sia gepatra lingvo la samajn rajtojn, kiuj estas principe agnoskitaj por pli grandaj lingvaj grupoj: propraj radio- kaj TV-elsendoj, propraj gazetoj, lerneja instruado pere de la gepatra lingvo ktp. Kiom ajn pravaj estas tiaj postuloj en la teorio, en la praktiko ili povas montriĝi tute nerealigeblaj.

Konstati la limojn inter teorio kaj praktiko estos unu el la celoj de la Ĝenerala Kunveno en Beograd. Kvar-hora kunsido estos dediĉita al ĝenerala enkonduko pri lingvaj rajtoj, analizo de la ĉefaj diversaj tipoj de plurlingvaj ŝtatoj kun koncizaj raportoj pri la situacio en almenaŭ kelkaj tiaj ŝtatoj, kaj ĝenerala diskuto.

Jugoslavio mem, kiel konate, estas ekzemplo de plurnacia, plurlingva lando, kiu faris grandajn klopodojn por trovi justajn kaj praktikajn solvojn de siaj internaj lingvaj problemoj. La venonta Universala Kongreso en ĝia ĉefurbo Beograd donas esperon pri tre interesaj kaj instruaj diskutoj kaj plia kontribuo al nia kompreno pri la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

V. Sadler

Parizo purigas la francan lingvon de anglaĵoj

Laŭ lastatempa raporto de la gazetar-agentejo AP, la franca registaro komencis en la 17a de januaro purigan kampanjon por forigi la anglajn vortojn el la franca. En la oficiala franca lingvo de nun anglismoj, kiel "hit parade" (gramofondiska parado de plej ŝatataj muzikaĵoj) kaj "tanker" (petrolŝipo), estos ne-akceptataj.

Terminologia komisiono, establita en 1970 de la tiama ĉefministro Jacques Chaban-Delmas, informis, ke ĝi trovis 350 francajn terminojn por anstataŭigi la anglajn terminojn, kiujn la francoj ĝis nun uzis por ŝtopi la malplenojn en sia gepatra lingvo. En la hodiaŭa numero de la franca ŝtata ĵurnalo ĉi tiuj vortoj estas publikigitaj kun la informo, ke ilia uzado de tiam estos devigita en registaraj publikigaĵoj. Aldone la komisiono insiste rekomendas al la popolo same alpreni ĉi tiujn vortojn en sian lingvouzon.

Ĉi tiu klopodo al lingvopurigo, entreprenita kun la

intelekta "beno" (apogo) de la Franca Akademio, ŝajnas aparteni al la registara strebado por pruvi, ke eblas adapti la francan al la postuloj de la moderna tekniko. Krome la "lingva edikto" ŝajnas direktita kontraŭ la atendata elpuŝiĝo de la franca, influate de la angla, el la rango de la plej grava lingvo en Eŭropa Komunumaro.

La komisiono koncentris sian purigadon unue al la ĵargono de "show biz" (spektaklo-entreprenado), la la televido, transportado kaj spaco-veturado.

La komisiono devis konfesi, ke oni malsukcesis pri tri vortoj, ofte uzataj en francaj aferistaj interparoloj. Temas pri la vortoj *software* (nekonkretaĵoj), *hardware* (konkretaĵoj) kaj *marketing* (enmerkatingo), por kiuj neniuj vere francaj vortoj estis trovataj. Ĉi tiuj vortoj restos uzataj, ĝis oni trovos pli taŭgajn terminojn.



Parlamentara grupo fondita

Kiel jam raportite en la januara "Esperanto", laŭ enketo farita de britaj esperantistoj montriĝis, ke almenaŭ 45 el la 100 enketitaj britaj parlamentanoj favoras Esperanton.

Pluraj el tiuj favorantoj starigis en la pasinta januaro Grupon de Parlamentanoj por Esperanto, kies prezidanto estas lordo Davies de Leek, kaj kies sekretarioj estas s-roj Ernle Money kaj Lewis Carter-Jones (parlamentanoj por Ipswich kaj Eccles, respektive). La Grupo havis sian unuan kunsidon en la 24a de januaro en la parlamentejo kaj aŭdis prelegojn de s-ro Money, s-ro Horace Barks (antaŭa lord-urbestro de Stoke-on-Trent), s-ro Raif Markarian (estro de mezlernejo) kaj d-ro John Wells (lekciisto de Universitato de Londono kaj UEA-estrarano).

La celo de la Grupo estas atentigi la parlamenton pri Esperanto, ĉefe per demandoj en la parlamentejo al la registaro, fareblaj en ĝia ĉiusemajna "demanda tago", kaj persvadi la registaron antaŭenigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

Filatela precedenco



Je la unua fojo en la historio, la Franca Poŝta kaj Telekomunika Administrado eldonis poŝtmarkon kun germanlingva surskribo.

La 23-an de januaro 1973, okaze de la dekjara datreveno de la efektivigo de la Traktato por Politika kaj Ekonomia Kunlaboro inter Federacia Respubliko Germanujo kaj Francujo, aperis en ĉiuj francaj poŝtofocejoj poŝtmarko je la valoro de 50 centimoj, desegnita de la famaj germanaj grafikistoj Heinz kaj Hella Schillinger.

La surskribo tekstas: "Dekjara Traktato pri la germana-franca kunlaboro 1963-1973." Aperas ankaŭ simila surskribo en la franca lingvo.

Ĝis nun neniu franca poŝtmarko aperis kun fremdlingva surskribo.

Poezia bataalkampo

Mini-revolucio pro poezio en la nederlanda lingvo estis evitita en Bruselo meze de februaro. Kiam la francparolanta urbestro de unu el la bruselaj komunumoj malpermesis planitan kaj jam permesitan "Nokto de Poezio", dum kiu flandraj kaj nederlandaj poetoj intencis deklami siajn verkojn, tuj reagis flandraj verkistoj, funkciuloj kaj organizaĵoj, laŭ kies vidpunkto la malpermeso estis provoko fare de la franclingva premgrupo. Ili insistis, ke la kultura programo okazu laŭ la jam farita plano, kaj ĝustatempe la provincestro de Brabant nuligis la malpermeson.

Jarlibro pri mondaj problemoj

Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (UIA), kies membro estas ankaŭ UEA, planas eldoni *Jarlibron de mondaj problemoj*, — mondaj problemoj, kiuj eventuale sumiĝus 5 000 laŭ takso de UIA.

Same kiel la aliaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun kelkaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj, UEA ricevis inviton kontribui por tiu celo. UEA tiurilate jam liveris informojn pri la lingva problemo, kiu estas evidente unu el la plej gravaj problemoj en la mondo.

La jarlibro estos volumo parenca al la 1200-paĝa *Jarlibro de internaciaj organizaĵoj*, eldonita de UIA kaj formale rekonita de Unuiĝintaj Nacioj.

Nova universitata kurso

La grava filio de la Universitato de Kalifornio en San Diego enkondukis oficialan kurson: *Lingvo/Esperanto 16: enkonduko al Esperanto*. La kataloga priskribo de la kurso diras: "Enkonduko al la strukturo de Esperanto, ĝia deveno kaj literaturo, kaj ĝeneralaj problemoj de planlingvaj projektoj. La studentoj atendeble scipovos paroli, skribi, legi kaj kompreni Esperanton je la fino de la kvaronjara trimestro."

La kurson ofertas la Lingva Centro de la universitato, kaj ĝi inkluzivas instruadon en la lingva laboratorio. La Internacia Lingvo estas unu el nur ses lingvoj aktive instruataj en la universitato en San Diego.

Informis Richard E. Wood

Zagreb jubileas



Redakta komitato de Esperantolingvaj elsendoj de Radio Zagreb. Emilija Lapenna, gvidantino, Vlado Jurkoviĉ, teknika reĝisoro kaj du junaj studentoj Darinka Antoniĉ kaj Nikolo Matijević, parolistoj.

En aprilo 1953 kunlige al la tiam okazonta 38a Universala Kongreso en Zagreb, komenciĝis elsendoj por esperantistoj ĉe Radio Zagreb. Dudek jarojn daŭras tiu aktivado ĉe la grava, neesperantista instanco, sen interrompo. Ĉiujŝade, nur 15 minutojn, je noktomezo*.

Ne ofte, ne longe kaj je nekonvena tempo-punkto. Rigardate el tiu angulo, tiu aktivado povus ŝajni facile realigebla. Ne estas tiel. Dum 20 jaroj elsenditaj estis 16 mil minutoj da preparitaj tekstoj sur 1 500 folioj. Do sufiĉe por 3, eĉ 4 libroj!

Teksto-preparado kaj surbendigado devas okazi je minuta akurateco, sen ia malfruiĝo. Radio Zagreb ne estas amatora instanco. Ĉio devas esti je profesia nivelo, ĉar la realigantoj de la elsendoj estas honorariaj pro sia laboro, kiel ĉiuj aliaj program-kreantoj de Radio Zagreb.

En ĉiuj ĵurnaloj ĉiusemajne aperas informo pri esperantlingva elsendo; tion rutine organizas la informa servo de la radio-stacio mem. Bedaŭrinde, dum 20 jaroj la send-anteno de Radio Zagreb estis la sola en Jugoslavio, kiu elsendis Esperantajn vortojn.

La programoj de la esperantlingvaj elsendoj ĉe Radio Zagreb estas turnitaj pli al eksterlanda ol al enlanda aŭskultanto. Esperantaj temoj oftas; tamen subteno de Esperantistoj, esprimita per sendo de poŝtaĵoj, ne abundas. Televidaj retoj estas pli ligitaj al la propra lando, radio estas multe pli internacia. Sidante en la propra ĉambro eblas venigi al si voĉojn el multaj, multaj eksterlandaj lokoj en plej diversaj lingvoj. Granda baro — tamen ĉe esperantlingvaj elsendoj ne konata. Aŭskultante nur radio-elsendojn, oni povas bone informiĝi pri la movadaj kaj ekstermovadaj novaĵoj plej komforte, ne streĉante okulojn. Malgraŭ tiu fakto, ne multaj esperantistoj aŭskultas elsendojn preparitajn por ili. La jubileanta radio-stacio informas vin pri sia adreso: Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41 Zagreb, Jugoslavio. Skribu; la respondo venos el la etero.

Emilija Lapenna


* Je 265 m, 5 minutojn post la noktomezo laŭ MET.

ĈE LA KUNFLUEJO DE ORIENTO

Oriento de Alpoj kaj okcidente de Karpatoj, norde de Adriatiko kaj sude de la ebena Panonia troviĝas malgranda lando, kiu en ĉi tiu jaro fariĝos konata al multaj esperantistoj. Tiu lando estas Jugoslavio, la lando, en kiu okazos la 58a Universala Kongreso de Esperanto.

Tiu malgranda lando estis, kaj hodiaŭ ankoraŭ estas, ligilo inter la oriento kaj okcidento, teritorio sur kiu kunfluas la kontraŭecoj de Eŭropo. La loĝantoj de tiu ĉi lando estis tre ofte en la pasintaj jarcentoj rimedo, per kiu oni kontentigis la apetitojn de granduloj. En tiuj okazoj tre sperte oni uzas jam jarcentojn malnovan kaj jarcentojn neekzistantan limon inter la orienta kaj okcidenta Romiaj imperioj, ĉar tiu ĉi limo, ĝis la plej nova tempo, restas demarkacio de la influo de kulturoj kaj aparte de eklezioj. Tiu diferenco jam longe estis la kaŭzo de reciprokaj konfliktoj kaj kolizioj, sed samtempe ankaŭ stimulo por ligo kaj unuiĝo.

Laŭ sia pozicio, Jugoslavio estas natura ponto inter la oriento kaj okcidento de Eŭropo, inter ĝia nordo kaj sudo. Pro tio, tra jarcentoj, vojoj de konkerantoj gvidis tra tiu ĉi lando kaj ĝiaj regionoj, komence de Hunoj kaj Avaroj, ĝis la plej novaj — faŝistoj. Kaj ĉiuj konkeradoj lasis postrestojn: ruinojn kaj brulrestaĵojn, kadavrojn kaj forlasitajn regionojn. Sed post ĉiu tempesto ekbrilas la suno, kaj post ĉiu konkerado venas resaniĝo. Kaj tiel tiuj detruoj kaj dezertigadoj donis novajn fortojn al ĉi tiuj homoj, la lando kiel




fenikso ĉiam denove renoviĝis, kaj eble pro tio ĝi estis ĉiam juna kaj plena de entuziasmo, pro tio ekzistas multaj monumentoj de diversaj kulturoj, de Lepenaĉki Vir ĝis nombraj monaĥejoj kaj aliaj mezepokaj konstruaĵoj kaj ĝis nombraj modernaj skulptaĵoj disĵetitaj tra urboj sed ankaŭ tra montaraj altaĵoj. Homoj, kiuj ĉi tie vivas, heredis de ĉiu el siaj prauloj kelkion: kuraĝon kaj ruzecon, klerecon kaj potencon de la korpo kaj animo, persiston kaj koleremon aŭ rapidecon karakterizan por ĉiamaj militistoj, sed ankaŭ mildecon de paŝtisto kaj gastamecon de izolito, kiu ĝojas pro ĉiu ŝanĝo kaj ĉiu nova vizaĝo, fidelecon de amiko kaj kapablecon kaŝadi sentojn, amon kaj malamon. Konekse al ĉiuj tiuj influoj estiĝis la hodiaŭaj loĝantoj de Jugoslavio. Sed ankaŭ ili tre diferencas inter si, ĉar ili apartenas al multaj nacioj, kiuj, en granda kaj malgranda nombro, pli kaj malpli koncentrite aŭ disĵetite vivas en pluraj lokoj tra la tuta lando. Ekzistas vilaĝoj, kiuj estas ununaciaj, sed tiaj urboj ne ekzistas, senkonsidere en kiu parto de la lando troviĝas, kaj senkonsidere kiu nacio donis la ĉefan karakterizon de la urbo.

Beograd, la ĉefurbo de Jugoslavio, estas en plena senco de tiu ĉi vorto la malgranda Jugoslavio: Beograd havas ebenon, samkiel ankaŭ Jugoslavio, sed ĝi troviĝas parte sur la montetoj de Avala. Sava kaj Danubo, du grandaj riveroj ĉe Beograd, povas por ĝi esti same kiel Adriatiko por Jugoslavio. La loĝantoj de Beograd apartenas al ĉiuj nacioj, kiuj loĝas en Jugoslavio. Ĝi estas la ĉefurbo de la respubliko Serbujo, tamen ĝi ne estas tipa urbo de Serbujo, sed ĝi estas la tipa de Jugoslavio.



NTO KAJ OKCIDENTO



Ĝiaj stratoj, en la malnova parto de la urbo, estis projektitaj kaj konstruitaj por piedirantoj, kaleŝoj kaj ĉevaloj aŭ bovaj jungaĵoj kaj fariĝis tro mallargaj por la nuntempa trafiko. Multaj el ili estas unu-direktaj. En la nova parto, nomita Novi Beograd, oni konstruis largajn bulvardojn. Por atenta observanto, Beograd estas la bildo de Jugoslavio ankaŭ per sia arkitekturo kaj urboplana aspekto, ĉar ankaŭ en ĝi oni povas vidi novaĵojn kaj malnovaĵojn unu apud alia. La novaĵoj estas jam dominantaj, sed de malnovaĵoj oni konservas ĉion, kio estas valora kaj rimarkinda. Tiu konata konstruista peno, karakteriza por la nuntempa Jugoslavio, estas facile rimarkita ankaŭ en Beograd, en kiu duono de la loĝantoj loĝas en loĝejoj konstruitaj post la Dua Mondmilito.

En Beograd estas jam registritaj dekoble pli da aŭtomobiloj, ol estis en la tuta lando en la jaro 1939, kaj la trafika situacio en la urbo tre similas al tiu, kiu estas en ĉiu granda urbo de Eŭropo. Ankaŭ pro pluraj aferoj Beograd kaj Jugoslavio similas al Eŭropo, sed per multaj aliaj ili gardas siajn individuajn karakterizojn.

Al la vojaĝanto, kiu venas en nian landon, prezentiĝas okazo kelkion vidi, surpriziĝi rimarkante ion, kion li eble jam ne plu esperas vidi ĉi tie. Venu unue, kaj vi revenos alian fojon almenaŭ por vidi eblajn ŝanĝojn.

Ĉedomil Huber, Beograd



Panorama rigardo al la urbo de la 58a Universala Kongreso de Esperanto: Beograd



La fortikaĵo Petrovaradin staras sur la bordo de Danubo vidalvide al la urbo Novi Sad – vizitocelo de unu el la tuttagaj ekskursoj kongresaj.


Tradiciaj moroj ankoraŭ vivas ĉie en Jugoslavio. Jen sceno el Trogir, malnova urbo ĉe la dalmatia marbordo, fame konata pro sia arkitekturo.



LEVIĜANTA PROBLEMO ĈIRKAŬ E.E.K.

es, den 20. november 1972
 , den 20. November 1972
 ls, 20 November 1972
 les, le 20 novembre 1972
 es, addi 20 novembre 1972
 20 november 1972

Generalsekretären
 for Rådet for De europæiske Fællesskaber
 Der Generalsekretär
 des Rates der Europäischen Gemeinschaften
 The Secretary-General
 of the Council of the European Communities
 Le Secrétaire Général
 du Conseil des Communautés européennes
 Il Segretario Generale
 del Consiglio delle Comunità Europee
 De Secretaris-Generaal
 van de Raad der Europese Gemeenschappen


 Calmes

La severa principo de egaleco de la ses oficialaj lingvoj — angla, dana, franca, germana, itala kaj nederlanda — en la EEK kondukas nuntempe al monstraj dokumentoj, en kiuj eĉ la dato aperas en ses diversaj formoj, kvankam preskaŭ identaj.

Proplendoj ricevitaĵ de Britujo, Irlando kaj Danlando pri la manko de traduk-rimedo por la angla lingvo kaj la dana, la Komisiono de Eŭropa Komunumaro (EK) klopodas trovi solvon de la lingvo-krizo de la novaj membroj.

La manko de tradukistoj de la angla lingvo, nun unu el la oficialaj lingvoj de la Komunumaro, kaŭzas gravajn malfruiĝojn de la tradukado de la regularo de Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) koncerne la komunan agrokulturan planadon por la tri novaj ŝtatoj-membroj.

La ĉi-rilata malfruiĝo de tradukado reliefigas aliajn malfruiĝojn kaj malefikecojn en la traduka fako de la EEK, kiuj grave malhelpas la laboron de la Komisiono de post la pligrandiĝo de la EK. Ne ĉiuj oficistoj ĝisfunde regas la francan lingvon.

Ĝenas la nov-alvenintojn la multaj dokumentoj trafluantaj iliajn fakojn. Oni rigardas ĉi tiujn dokumentojn kiel akceptitajn, se ili ne estas prikomentitaj dum difinita periodo. La plimulto de la dokumentoj estas nur en la franca lingvo kaj la enhavo estas tre teknika. Rezultas, ke la novaj anoj implicite aprobas regularojn kaj proponojn, kies detalojn ili ne tute komprenas.

Plurfoje la britaj kaj irlandaj funkciuloj atentigis la Komisionon pri la problemoj. La danoj plendis, ke la tradukservoj en ilian lingvon postrestas tiujn por la angla.


Unu el la problemoj estas la nerealismaj limdatoj, kiujn starigas la diplomatoj por la plenumo de la taskoj. Al la funkciuloj ne nur ne sufiĉas la tempo por fari la laboron sed estas eĉ malpli da tempo por havigi adekvatajn tradukaĵojn.

La Komisiono klarigas, ke estas malfacile trovi sufiĉe altnivelajn tradukistojn.

— *International Herald Tribune*, 1973-02-02

AL LA TRIA LABORPLANO

“Agu
 ĉiam en
 plena
 konkordo!”




L. L. Zamenhof

Laborplano por longa periodo devas prikonsideri ĉiujn eblajn faktorojn de la evoluo. Nur multflanka, racie trapensita plano, kies eroj harmonie akordas, povos nin konduki al pluaj sukcesoj. Mi plene akceptas la prudentajn vortojn de d-ro W. Bormann, kvankam komence mi ankaŭ opiniis alimaniere.

Per ĉi tiu artikolo mi volas alporti al vigla diskutado novan temon, kies profunda analizo ŝajnas al mi tre aktuala antaŭ la Kongreso.

Jam ne nur unu fojon kaptis min dilemo; ĉu ni, esperantistoj, vere sekvas la vortojn de Zamenhof, ĉu ni iras “la vojon celitan”? Mi ne dubas eĉ unu minuton pri la sincereco de nia membraro, nek pri la bonvolo de miaj lingvofratoj. Tamen, reirante al la fonto de la Internacia Lingvo, ĉiu post la unua gustumo el ĝi rekonas, kiu ideo donis konkretan formon al Esperanto; la revo vivi en akordo, plena harmonio; vivi en regno, kie “falas la kadukaj muroj”. Kaj Zamenhof plurfoje elpaŝis publike kaj avertis, kiam pli malpli grandaj obstakloj baris la iratan vojon, kiam ekregis malpaco inter la esperantistaro. Kaj tio, bedaŭrinde, kaŭzis al li multan aflikton. En sia

Eŭropa Esperanta kongreso Pentekosto 1973



Luksemburgo: kvartalo "Faubourg du Pfaffenthal"

En la urbo Luksemburgo je Pentekosto ĉi-jare okazos Eŭropa Kongreso de Esperanto. De la 8a ĝis la 12a de junio kunvenos esperantistoj el preskaŭ ĉiuj landoj aliĝintaj al Eŭropa Ekonomia Komunumo.

En la kadro de la Kongreso okazigos siajn oficialajn jarkunvenojn kvin landaj Esperanto-asocioj: la belga, franca, germana (FR), luksemburga kaj nederlanda. Partoprenos ankaŭ italoj kaj esperantistoj de aliaj landoj. La belga ministro pri eksterlandaj aferoj, s-ro

Renaat van Elslande, akceptis eniri la Honoran Komitaton.

Krom la jarkunsidoj de la landaj asocioj, okazos fakaj kunvenoj, ekumena diservo, kultura vespero, balo kaj bankedo. La partoprenantoj ankaŭ havos la eblecon ekskursi en la turisme alloga kongres-urbo.

Per la ekzemplodona uzo de la Internacia Lingvo dum ĉi tiu aranĝo, la kongresanoj montros, kiel facile estas superi la lingvajn barojn, kiuj daŭre ĝenas la efikan plenumadon de la funkcioj de la Komuna Merkato.

lasta kongresa parolado li kvazaŭ profete testamentis: "Agu ĉiam en plena konkordo!" De tiam pasis pluraj jardekoj, tamen la vortoj sonas en mia koro kvazaŭ eldiritaj ĉi-tage.

Fakte, ni trabaraktis plurajn krizojn, mondŝanĝojn, kiuj iufoje povis naski konflikton inter ni, fakte la esperantistaro travivis dum sia ekzistado diversajn provojn, kiuj ne ĉiam finiĝis sukcese, fakte pluraj noblaj elpensoj abortiĝis dumvoje, sed de tempo al tempo ĉu ni forgesis aŭskulti atente al la avertaj vortoj, profete deflugintaj de liaj lipoj? Kredeble, jes. Mi ne riproĉas nian "popolon". Ĝi estas brava, entuziasma kaj batalpreta. Ni kredas kaj kredigas, ke Esperanto estas jam venkonta, kaj ke troviĝas multaj esperantistoj aktive, sindone laborantaj por nia afero. Sed ĉiu volas utile labori, venas al ni kure kun sia "granda ideo" (efektive ili plej ofte estas bonaj!), sed forgesas pri tio, kiuj krom li realigu la ideon. Poste, perdinte esperon, li akuzas la lingvon aŭ la lingvanojn kaj ne analizas sufiĉe, ĉu lian ideon bezonas la movado aŭ ĉu la kondiĉoj estas maturaj por kolekti la fortojn de nia malgranda "popolo". Kaj

kiom da gravaj kampoj atendas laboremulojn. Neniu povas rajdi sur du ĉevaloj.

Mia konkludo vortiĝas do jene: Ni devas atingi, ke en la movado regu *disciplino*. Tia disciplino ne estas blinda obeemo, nek humiliĝo, male disciplino estas fonto de vera demokratio, en tia disciplino la fortoj kunagas, kaj, se oni batas, ne vitro tintas, sed pordego frakasigas. Konscia pri tio, ke ni devas bati multajn pordojn samtempe, mi dike substrekas la signifon de ekonomia fortodivido de disciplinita kolektivo. Ni bezonas celkonsciajn, entuziasmajn homojn kun rokfirma volo kaj fido; ni ne povas permesi, ke la ĉefbaton senefikigu flankaj, ne sufiĉe preparitaj privataj manovroj.

Karaj amikoj, la supraj meditoj certe ne povas esti en la teksto de nia 3a laborplano, estus eĉ superflue; sed laborante por ĝi ni neniam perdu el la vido: ĝiaj celoj kaj nia tuta soifata triumfo senfabeliĝos nur, se ni, batalantoj de la sama fincelo, firme tenos la manojn.

G. Kurucz, Hungarujo

INFORMOJ DE CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middx., HA9 8TF, Britujo. Telefono (01) 904 4081.

ENKETO PRI PARTOPRENO EN INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

En 1972 CED entreprenis enketon pri la nombro de personoj, kiuj partoprenas internaciajn kongresojn, konferencojn kaj aliajn kunvenojn, en kiuj Esperanto estas uzata kiel oficiala lingvo. La enketo rilatas nur al la jaro 1972. Multaj organizintoj de tiaj renkontiĝoj resendis al CED la plenigitan enketan folion, sed sufiĉe multaj ne reagis ĝis la mezo de januaro 1973. Por ke la rezultoj de la enketo estu kiel eble plej kompletaj, CED afable petas ĉiujn organizintojn de internaciaj kongresoj, konferencoj kaj aliaj kunvenoj kun internacia karaktero (ekzemple landaj kongresoj kun iom granda partopreno de alilandaj gastoj), resendi la plenigitan enketan folion al la Oficejo de CED en Londono. Instancoj respondecaj pri organizo de tiaj renkontiĝoj povas aŭ ricevi pliajn ekzemplojn de la enketaj folioj, aŭ respondi sur aparta folio al jenaj demandoj: lando, kaj poste 1. oficiala nomo de la kunveno; 2. loko kaj datoj; 3. ĉefa(j) temo(j) de la kunveno; 4. nombro de (a) aliĝintoj el kiom da landoj, (b) partoprenintoj el kiom da landoj; 5. adreso de la respondeca organizinta instanco.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO

En 1954 aperis la verko *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, eldonita de CED. Tiu verko jam delonge elĉerpiĝis kaj CED havis la intencon publikigi la duan eldonon, reviziitan kaj kompletigitan. La laboro etendiĝis ĉiam pli al multaj faktoj kaj aspektoj, eĉ ne tuŝitaj en *La Internacia Lingvo*. Paralele kun la progresado de tiu grandega laboro montriĝis ĉiam pli, ke ne povos temi pri dua eldono de la menciita libro, sed fakte pri tute nova verko. Kvankam ankoraŭ ne estas farita definitiva decido rilate la titolon, tamen plej verŝajne ĝi estos: *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*. La vorto "perspektivo" plej adekvate reflektas la enhavon, ĉar ĝi rilatas ne nur al la pasinteco kaj aktuala stato de Esperanto, sed ankaŭ al ĝia estonteco. La verko konsistas el 5 partoj kun entute 23 ĉapitroj, antaŭparolo kaj enkonduko, du ampleksaj indeksoj (persona kaj tema), ilustraĵoj. La libro nun estas kompostata kaj ĝi aperos en tre baldaŭa estonteco, se iel eble en junio; se ne, do almenaŭ iam poste en 1973. Detaloj aperos en la sekvanta komuniko de CED.

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ EN 1972

Laŭ la statistiko, ellaborita de s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED por la radio, la nombro de ĉiuj radioelsendoj en la Internacia Lingvo en 1972 estis 2 354 kompare kun 2 817 en 1971. La elsendoj entute daŭris 875 horojn kompare kun 960 horoj en 1971.

La nombro de stacioj estis 17 en 14 landoj kompare kun 19 stacioj en 16 landoj en la jaro 1971. El la radio-stacioj, kiuj en 1971 disaŭdigis programojn en Esperanto, ĉesigis la elsendojn Rosario (Argentino), Stoke-on-Trent (Britujo) kaj Sherbrooke (Kanado). Aliflanke la radio-stacio de Tananarive aldoniĝis al la listo. Plej multajn elsendojn (732) havis radio Varsovio, kiu, krome, prezentis 233 Esperantajn elsendojn en la t.n. "Anguletoj dum nacilingvaj programoj". Radio Pekino estas la dua laŭ la nombro de elsendoj (312); Columbus (Usono) havis 300 elsendojn kaj Bern (Svislando) 208. Muritiba kaj Sorocaba en Brazilo, Clermont-Ferrand en Francujo, Sabadell kaj Valencio en Hispanujo, Romo, Zagreb, Gdańsk havis 52 elsendojn ĉiu.

Necesas aldoni la televidan kurson de Esperanto, kiun faris kaj prezentis la nederlanda televida institucio Teleac. Tiu kurso konsistis el 52 elsendoj dum po 30 minutoj, dufoje semajne. La kurso, do, entute daŭris 26 horojn.

CED varme rekomendas aŭskulti la programojn en Esperanto kaj skribi al la koncernaj stacioj por komenti la elsendojn. Tio estas esence grava por firmigo de la pozicioj de la lingvo en la radio. Estus tre utile, se la personoj laborantaj sur la kampo de radio povus iniciati pliajn elsendojn en la Internacia Lingvo surbaze de la jam atingitaj rezultoj.

NOVAJ DOKUMENTOJ DE CED

Pro la verkado de *Esperanto en Perspektivo*, kio forprenis kaj plu forprenas amason da tempo, la dokumentoj de CED aperis en la lastaj monatoj iom neregule. Nun estas pretaj pluraj novaj dokumentoj, kiuj estos eldonitaj en la sekvantaj tagoj. Inter ili troviĝas la dua eldono de A/II/5 (La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj) en la angla; RDC/7 (Bazaĵ Faktoj pri la Internacia Lingvo), tria reviziita eldono en la angla; dokumento pri la UK en Portland, Seminario en Frostavallen, ISU, Belartaj Konkursoj, Radio-Elsendoj, Historio de Esperanto en Ĉinujo, Someraj Universitataj Kursoj, k.a.

Donacoj por CED en 1971

La stato je la 15a de novembro 1971	£ 215, 69
S-ro Ragnar Hjort, Svedujo	1, 18
S-ro E. Burg, Nederlando	1, 47
S-ro K. Greutert, Svislando	1, 19
S-ro P. Zacho, Danlando	3, 00
S-ro David Kennedy, Britujo	5, 00
S-ro E.F. Dean, Britujo	54, 00
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1, 00

Stato je la 31a de decembro 1971 £ 282, 53

Donacoj por CED en 1972

Gesinjeroj Laurie, Britujo	£ 4, 00
S-ino Seddon, Britujo	5, 20
S-ro E.F. Dean, Britujo	25, 00
S-ino Marjorie Duncan, Aŭstralio	5, 00
F-ino M. Meijwes, Nederlando	1, 09
S-ro E. Burg, Nederlando	30
S-ro R. Slot, Nederlando	12, 06
S-ro K. Greutert, Svislando	1, 21
K.K.K. Danlando	10, 86
Gesinjeroj Holmes, Britujo	1, 00
S-ro E. Burg, Nederlando	30
S-ro R. Hjort, Svedujo	1, 20
S-ro E.F. Dean, Britujo	25, 00
S-ro K. Greutert, Svislando	1, 20
S-ro Mag. I. Dratwer, Israelo	1, 20
S-ro H.M. Schippers, Nederlando	5, 99
S-ro E. Burg, Nederlando	94
S-ro J. Giessner, F.R.G.	83
S-ro E. Burg, Nederlando	30
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, Novzelando	4, 58
S-ro J. Giessner, F.R.G.	83
S-ro E. Burg, Nederlando	30
S-ro E. Burg, Nederlando	32
S-ro Gesinjeroj David Kennedy, Britujo	5, 00
S-ro E. Burg, Nederlando	32
S-ro E. Jolliet, F.R.G.	77
M.E.C.	7, 47
S-ro E. Burg, Nederlando	33
S-ro E.F. Dean, Britujo	50, 00
S-ro E. Burg, Nederlando	33
IFEK-Kongreso, Svislando	22, 52
S-ro K. Greutert, Svislando	1, 32
Prof. G. Waringhien, Francujo	2, 56
S-ino B. Salt, Kanado	115, 38

Stato je la 31a de decembro 1972 £ 314, 69

.....

Al ĉiuj donacintoj tutkoran dankon. Speciale al tiuj geamikoj de CED, kiuj regule, ĉiujare, kontribuas laŭ siaj eblecoj al la laboro de tiu ĉi institucio. La donacoj en 1972 — en kiu CED memorigis la 20-jaran datrevenon de sia eklaboro — estis la plej altaj en la tuta historio de CED. Tio ne nur prezentas fincan helpon, sed ankaŭ signifas grandan kuraĝigon por la kunlaborantoj, kiuj per minimumaj rimedoj sukcesas konservi kaj evoluigi CED kiel esence gravan institucion por la progresigo de la Internacia Lingvo.

Ĉu vi kapablas instrui Esperanton je supera nivelo?



Katedro de Esperanto, Universitato de La Laguna, Hispanujo

La Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) denove ekzamenos kandidatojn en Beogrado (Jugoslavio), okaze de la Universala Kongreso. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi laŭeble plej frue (limdato: la 28a de aprilo) al la sekretario de la IEK (d-ro J. C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London S.W.19, Britujo): esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas 7,20 gld. aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la sekretario de la IEK aŭ de la Centra Oficejo de UEA. De la Centra Oficejo estas mendebla ankaŭ listo de 79 specimenaj demandoj, kiuj estis efektive prezentitaj en la Internacia Ekzameno inter 1962 kaj 1972. Ili donas al la kandidato klaran imagon pri la speco de ekzameno, kiun li frontas. Prezo de la specimena demandaro: 3 respondkuponoj (1,50 gld.) inkl. afrankon.

LOKE — FAKE — PERSONE

LOKE

Afriko

- Laŭ la *Statistika jarlibro de Unesko 1971*, 6 landoj en Afriko havas nur po 1 ĵurnalon, kaj 44 landoj havas neniom. Dum en Svedujo — unuavice — po 534 ekzempleroj estas liverataj por mil personoj kaj en Japanujo 511, Gano, kiu havas plej altan ciferon en Afriko, havas po 46 ekzemplerojn por mil personoj. Margene, la revuo *Esperanto* estas legata en 19 afrikaj landoj, kvankam po kelkaj ekzempleroj.

Britujo

- Esperanto servis kiel la lingvo de nenomita fremda ŝtato en lastatempa kolortelevida felietono. Okazas trifoje parolo en Esperanto, klare kaj bele prononcita. La unua dissendo okazis la 18an de novembro 1972 je 17.10 h. en la komerca programo de I.B.A.

Belgujo

- *Unesco informatie*, periodaĵo eldonata de la fako Internacia Kultura Rilato de la Ministerio pri Nacia Edukado kaj Nederlanda Kulturo (vidu: *Esperanto*, 1973, p. 32), komencis publikigi Esperanto-kurson ekde sia januara numero.

Bulgarujo

- La plej disvastigita ĵurnalo (700 mil ekz.) en Bulgarujo, "Rabotniĉesko Delo", la 19-an de januaro k.j. aperigis grandan artikolon "Aktiva kaj frukto-dona agado" de N. Aleksiev, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio. Ĝi emfazas la sukcesojn de la movado esperantista en la lando kaj markas la bonajn perspektivojn por la estonteco.
- Okaze de la Internacia Specimena Foiro en Plovdiv (1973-09-08 ĝis -10), la loka Distrikta Esperanto-Komitato aranĝos Foiran Esperanto-Renkonton (adreso de la organizantoj: poŝtkesto 184, Plovdiv) kun variaj programoj. La pasintjaran Renkonton partoprenis pli ol 250 personoj.

Ĉeĥoslovakujo

- Fine de la ĉi-jara januaro komenciĝis Esperanto-kurso en Hotelo Esperanto (adreso: okr. Lipt. Mikuláš, 03242 Pribylina) por ĝia personaro.

Germana Demokratia Respubliko

- La populara dusemajna gazeto "Freie Welt" kun eldonkvanto de 400 mil ekzempleroj, en sia numero de la 1972a decembro, publikigis 4-paĝan artikolon pri Esperanto. Ĝi konsistas el du intervjuoj: kun s-ro Detlev Blanke, kiu konvinke pretendis diversajn faktojn pri la Internacia Lingvo, kaj kun s-ro K. Gusev en Moskvo.

Hungarujo

- Ekde ĉi tiu marto funkcias sabata kunveno de infanoj, malpli aĝaj ol 6-jaraj, denaske lernintaj Esperanton, en la oficejo de Hungara Esperanto-Asocio, kiel infanvartejo, de la 7.30 h. ĝis la 14.00 h.

Italujo

- La itala vicministro pri transportoj kaj civila aviado, deputito Salvatore Cottoni, akceptis (en 1973-01-08) delegacion de esperantistoj ĉefe fervojistaj, i.a. d-ro Manlio Galli, prezidanto de la Itala Federacio de Esperantistaj Fervojistoj kaj ĉefinspektoro de la Itala Ŝtatfervojo.

Kolombio

- Sekve de la 20 horoj da sukcesa kurso en la universitato "Universidad Pontificia Bolivariana" (Medellín) (vd. *Esperanto*, 1972, p. 170), la estraro de la universitato akceptis denovan Esperanto-kurson de 30 horoj, kiu komenciĝis en la 17a de februaro. La kurson gvidas prof-o Manuel Angel M., direktisto de la fako de modernaj lingvoj.
- Sekve de la oficiala Esperanto-kurso en la universitato "Universidad Pontificia Bolivariana" (vd.: *Esperanto*, n-ro 802, p. 170) komenciĝis ankaŭ en "Universidad Autónoma Latinoamericana", en la sama urbo Medellín, simila kurso por ne nur studentoj sed ankaŭ universitataj funkciuloj kaj ne-universitatanoj. Pro la aktiveco de Esperanta Dialoga Asocio jam kreiĝis en tiu urbo bonvena etoso por la Internacia Lingvo.

Koreujo

- 250 personoj, grandparte universitatanoj kaj oficistoj, partoprenis novan intensan ĉiuvesperan kurson dum 50 tagoj ekde la 10a de januaro en Universitato Guk-Je en la ĉefurbo Seulo, Suda Koreujo. Gvidis ĝin juna aktivulo s-ro So bom-su. La novaj lernantoj bonvenigas korespondpetojn p/a Esperanto-Instituto en Universitato Guk-Je, N-ro 2-2-2, Ĉungĵung-Ro, Sodemun-gu, Seulo, 120.

Rumanujo

- Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato nun ellaboras statuton por la nove establota Rumana Esperanto-Asocio. La mildiĝon de la registara sinteno — onidire — kaŭzis la partopreno de rumanaĵ ŝtataj pupteatroj al la ĉiujara Pupteatra Internacia Festivalo, pri kiu oni povas legi de tempo al tempo en *Esperanto*.

Tamiko Kaŭakami en Afriko (Vidu: Persone)





Antaŭ la modernigita oficejo de Brita Esperantista Asocio s-ro Satoo Ŝ. ĝuas amikecan atmosferon kun esperantisto el Kanado. (Vidu ĉe "Persone".)

Svislando

- La "Eŭropa Feriosemajno en Svislando", okazanta en Fürigen ĉe Kvarkantona Lago (1973-09-02 ĝis -08), estas destinita ne nur al esperantistoj sed ankaŭ iliaj geamikoj, kiuj povos ricevi Esperanto-lecionojn tie, ĝuante feriadon. Detale informas la sekretario de la organizanta Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg).

Usono

- Dum pasintjare la urbo Ĉikago proklamis per dokumento precedence la Semajnon de Internacia Amikeco, ĉi-jare la ŝtato Illinois, kiu inkluzivas Ĉikagon, proklamis la Semajnon sammaniere. Al tiu decido kontribuis la peto de la Esperanto-Societo de Ĉikago, kio staras en la publikigita dokumento mem.

En la redakta momento, ankaŭ la urbo Portland (Oregon) proklamis la Semajnon.

- Komencgradan Esperanto-kurson nun sendas radio-stacio KGTS-FM, 91,3 mcs. La taga programo (lunde ĝis vendrede) daŭras 15 minutojn je la 8-a h. atm. S-ino Robert Wills de Worthington, Ohio, instruas la kurson, kiu nun ankaŭ estas uzata de WOSU (Columbus, Ohio) kaj KBPS (Portland, Oregon). Studentoj de Kolegio Walla Walla funkciigas la elsendojn.

FAKE

Aviado

- La nederlanda flugkompanio KLM decidis ŝanĝi sian kutimon uzi unuavice la anglan lingvon por anoncado en siaj internaciaj flugoj ekde la pasinta januaro, por ke la nederlanda lingvo estu ĉiam unuavice uzata. Tiun ŝanĝon kaŭzis protesto de nederlanda pasaĝero, membro de UEA, kontraŭ la diskriminacia "kutimo".

Filatelio

- La UEA-delegito kaj fakdelegito en Bologna (Italio), s-ro Germano Gimelli, partopreninte la italan Interdepartementan Fervojistan Filatelan Ekspozicion okazintan en la 1972a decembro per sia kolekto de Esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj, gajnis premiojn kaj diplomon de la koncernaj oficialaj instancoj.

Komerco

- Du grandaj internaciaj foiroj reklamas sin per Esperantaj afiŝoj, nome Foiro de Milano (1973-04-14 ĝis -25) kaj 41a Internacia Foiro de Barcelono (1973-06-02 ĝis -12).
- La filio de Pirot (Jugoslavio) de la Institucio por Asekuro kaj Reasekuro "Jugoslavio" finance helpas la tiean Esperanto-societon "Tapiŝurbo" en ĝia laborado.

Literaturo

- Pasintjare fondiĝis Sekcio de Esperantistaj Literaturoj en Bulgarujo (SELEB) en la kadro de la landa asocio. Ĝi celas instigi ilin al verkado kaj akceli la disvolvon de la originala kaj traduka Esperanto-literaturo. La iniciatinto estas Asen Grigorov.

Pentrarto

- La hispana urbo Sankta Koloma de Gramanet duafoje organizas Internacian Konkurson-Ekspozicion de Infanaj Pentraĵoj (akvarelaĵ). La urbo atendas kontribuaĵojn el la tuta mondo, uzante Esperanton por varbi ilin. La aĝolimoj de la partoprenantoj estas de 6 ĝis 14 jaroj; la temo, libera; la limdato, 1973-04-10. Oni sendu pentraĵojn al: Excmo. Ayuntamiento, "Ponencia de Cultura", Santa Coloma de Gramanet (Barcelona), Hispanujo.

Sporto

- La jam 14a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno en Aŭstrujo, okazanta nun en la redakta momento, ricevis salutojn de dudeko da oficialaj instancoj, i.a. de la federacia prezidanto d-ro Franz Jonas, la federacia kanceliero d-ro Bruno Kreisky kaj 9 federaciaj ministroj. La nombro de la premiaĵoj (plejparte pokaloj) donacitaj ankaŭ de diversaj instancoj fariĝis ĉi-jare 38 por la diversaj konkursoj de 54 partoprenantoj. (La adreso de la organizanto: s-ro Johan Geroldinger, Wienerstr. 2 c, A-4020 Linz.)

Sennaciismo

- La 46a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos en Toronto (Kanado) de 1973-07-30 ĝis -08-06. Informojn donas: "Esperanto", P.O. Box 246 Station F., Toronto, Ontario, Kanado.

PERSONE

Kaŭakami

- Vojaĝante tra orienta Afriko en la pasintaj decembro kaj januaro, f-ino Kaŭakami Tamiko, japanino loĝanta en Norvegujo, faris kontaktojn kun ĵurnalejoj kaj radio-stacioj kaj disdonis informilojn pri Esperanto. Ŝi intencas en la venonta julio viziti Ugandon, Kongon, Sudanon, Tanzanion, Mozambikon, Rodezion, Malavion kaj Somalujon, ĉefe por dissemi ilojn da informiloj pri la Internacia Lingvo.

Satoo

- Por la funkcio de unu el la du interpretistoj por la pasintjara grupvojaĝo de lernejoj kaj vicestroj el Japanujo, s-ro Satoo Ŝooiĉi estis elektita de la Ministerio pri Edukado el 70 kandidatoj, antaŭ kiuj krom antaŭ la ekzamenantoj li deklaris, ke li nepre volas utiligi Esperanton krom funkcii kiel interpretisto por la angla lingvo. Efektive li sukcesis dum ilia vojaĝo tra Eŭropo montri la utilecon de la Internacia Lingvo.

ETERNE FREŜA PRINTEMPO IDILIO

Recenzas Lina Gabrielli (Italujo):

Printempo en la aŭtuno, de Julio Baghy, Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1972 (represo). 116 p. 19 cm.

Jen ĉarma, freŝa historieto verkita en la belsona stilo de la aŭtoro de "La verda koro"!

Temas pri amo de du gejunuloj, Adamo kaj Eva, por kiuj aŭtuno fariĝas printempo, ĉar printempo estas kiam burĝonas amo.

Sed tiu ĉi miraklo povas daŭri nur unu tagon, ĉar Eva, kiu apartenas al la cirklo de majstro Baltazar kaj de arlekeno Fridolin, devas forveturi kun la du maljunuloj por atingi alian foiron.

Tamen Adamo kaj Eva volas esperi pri nova renkontiĝo en aprilo, por kroni ilian amon. Ankaŭ Fridolin volas esperi kaj kredi. Ne kredas majstro Baltazar, laŭ kiu la vivo estas ŝajno.

Historieto kortuŝa, eĉ ofta: amo kaj disiĝo, espero kaj malespero. Nur unu paro inter mil realigas la unuan revon. Sed ni esperu, ke por tiu ĉi paro la disiĝo estas ŝajno, ke la nova renkontiĝo plenumiĝos.

Mendu ĉe UEA: 6,42 gld. (por Nederlando 6,68 gld.) plus sendokostoj 10%.

NOVA LERNOLIBRO POR HISPAN- PAROLANTOJ



Recenzas Manuel Angel M. (Kolombio):

Curso completo de idioma internacional Esperanto, de E. Rodriguez Ontoria. Buenos Aires: la aŭtoro, 1972. 164 p. 23 cm.

Tiu ĉi kurso por hispanlingvanoj certe kapablas konigi la esencon de la lingvo en nuraj 26 lecionoj. Ĝi enhavas utilegajn fakajn vortlistojn, bonan vortareton en la fino, gramatikajn terminojn kaj proverbaron. Per tia metodo la lernanto ne enuiĝas sed kontraŭe estas kontenta pro la rapida progreso.

La lernolibro elstaras per sia bonkvalita papero kaj estas klare presita. Mi rimarkis multajn preserarojn, kaj streketo ĉiam mankas en Universala Esperanto-Asocio. En estonta eldono konvenas korekti ilin aŭ aldoni tabelon de preseraroj.

Mi varme rekomendas la libron kaj deziras al ĝi la meritatajn sukcesojn. Ĉiu hispane parolanta esperantisto devas ĝin posedi. Ĝi estas bona helpilo por geinstruistoj.

Mendu ĉe UEA: 6,24 gld. (por Nederlando 6,49 gld.) plus sendokostoj 10%.

TRILOGIO 'TORENTO' DENOVE HAVEBLA



Recenzas Hector Boffejon (Svislando):

Al Torento (3a eld), *Infanoj en Torento* (3a eld), *Junuloj en Torento* (1a eld), de Stellan Engholm. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1972. Resp. 95, 100, 144 p. Ofsetitaj. 19,5 x 14 cm.

La novelon *Al Torento* oni povus iel konsideri kiel enkondukon al la du aliaj verketoj *Infanoj en Torento* kaj *Junuloj en Torento*, kiuj fakte estas du partoj de unu romano.

Kun Karlo, juna kamparano allogita de la urba vivo, *Al Torento* kondukas nin en la urbon, kiu, kun sia ĉirkaŭaĵo, estas la scenejo, ankaŭ de la du aliaj verkoj. Karlo trovas tie nur seniluziiĝon, ĝis fine tamen nobla amo kunligas lin kun Enjo kaj feliĉigas lin. En *Infanoj* kaj *Junuloj* la leganto kunvivas la ĝojojn de kvar puranimaj geknaboj pro ilia senafekta natura vivo, kaj iliajn ĉagrenojn pro iliaj seniluziiĝoj kaj antaŭ la nekomprene kaj ankaŭ antaŭ la malbona konduto kaj maldecaĵoj de iliaj familianoj kaj samurbanoj.

Stellan Engholm kolorriĉe kaj poezie pentras la scenejon kaj ĉarme kaj plaĉe rakontas pri la homoj. La psikojn kiel de la infanoj tiel ankaŭ de la plenkreskuloj li sincere kaj objekte priskribas, kvankam lia analizo de karakteroj kaj situacioj restas ĝenerale tro supraĵa.

Entute la malgranda amplekso kaj la modesta, kvankam agrabla, prezento de tiuj libretoj iugrade kaŝas nekonjektitan psikologian kaj socialan enhavon pri la antagonismoj kaj konfliktoj inter du generacioj kaj du vivmanieroj.

La stilo estas facila, flua kaj bela. Tamen trafas la atenton kelkaj neordinaraj esprimoj kiel "devesti sin", "frakasi proponojn", kaj la nekutima uzo de adverboj *plu*, *tre* kaj *ankoraŭ* fine de la frazo: "ne estas amuzo plu", "mi ne estas knabo plu", "tiaj aferoj ne interesas min tre", "mi ne povas pli bone ankoraŭ", "ĉu vi ne havas tempon ankoraŭ?"

Eraro ŝajnas: la suno faras sian vojon (kaj aliloke: la steloj moviĝas) *trans* la ĉielon (= *tra* aŭ *en* la ĉielo?).

Kelkaj malmultaj preseraroj ne ĝenas la legadon.

Mendu ĉe UEA: resp-e 5,46 gld., 6,42 gld., 8,58 gld. (por Nederlando, resp-e 5,68 gld., 6,68 gld., 8,93 gld.) plus sendokostoj 10%.

ESPERANTO KIEL LITERATURA ESPRIMO- ILO — DOKTORIGA DISERTACIO

LASTE APERIS ...



Antologio de amoro (1972) Diversaj aŭtoroj pseŭdonomaj. 51p. 21cm. Mimeo. 2,94 gld. Dua reviziita eldono de kolekto de erotikaj poemoj kaj rakontoj.

Esperanto language as a literary medium, The (La Esperanta lingvo kiel literatura esprimilo) (1971) Margaret G. Hagler. 436p. 21cm. Mikrofilme kserografiita. 50,— gld. Anglalingva disertacio prezentita al la Universitato de Indiana, Usono, por doktoriĝo pri kompara literaturo. Historia pritrakto de Esperanta literaturo de 1887 ĝis 1970 kaj stilistika analizo de traduka kaj originala Esperanta poezio.

Okupacio (1969) Erni Krusten (1900-). El la estona tr. Hillar Saha. 90p. 17cm. 2,16 gld. Romaneto de elstara prozverkisto, kiu priskribas homajn sentojn kaj idealojn dum la germana okupacio en Estonio en 1941-44.

Turismo ĉirkaŭ Tomakomai (1972) Turisma Asocio de la urbo Tomakomai, Hokkajdo, Japanujo, Asahi-mati 1, p/a Sangyō Kaikan. 12p. 19 x 21 cm. Kolorilus. prospekto.

Winnie-la-Pu (1926) A.A. Milne. Tr. Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin eld. 1972. Kun anglalingva enkonduko pri Esperanto kaj vortlisto de la redaktinto, Humphrey Tonkin. 164p. 20cm. Ilustraĵoj de Ernest H. Shepard el la originala angla eldono. Bind. 16,38 gld.; broŝ. 9,66 gld. Mondfama infan-klasikaĵo pri la knabo Kristoforo Robin, la urso Winnie-la-Pu kaj aliaj bestoj-amikoj.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

Nova disko-kurso en la angla lingvo

La Esperanto-kurso *Home Study Course In Basic Esperanto** havas duoblan celon. Unue, ĝi estas programita lernolibro por komencantoj angla-lingvaj en gimnazio aŭ alta lernejo, kiujn instruos profesoro de lingvoj modernaj sen longedaŭra antaŭpreparado pri Esperanto. Due, ĝia celo estas ebligi al studanto de meza klereco akiri bazan kapablon paroli, kompreni, legi kaj korespondi en la Lingvo Internacia. Ĝi enhavas dek kvar lecionojn en lernolibro kaj dek kvar diskoj. La lernodaŭro estas dekkvarhora por studanto serioza. Ĉefa emfazo estas metata je la aŭskultado de klare elparolitaj tekstoj ofte ripetitaj, ekzercoj variaj, ĉefe buŝaj sed ankaŭ skribaj, klarigo de punktoj gramatikaj kun multaj ekzemploj, dialogoj, en kiuj troviĝas frazoj utilaj kaj ĉiutagaj. Post la dek kvar lecionoj, kiuj temas pri la ĉefaj gramatikaj elementoj, sekvas Aldono, kiu ebligas al la studanto daŭrigi siajn studojn ĝis pli profunda kompreno de la lingvo.

La voĉoj sur la diskoj estas tiuj de prof-o Jonathan Pool de la Ŝtata Universitato de Novjorko; de prof-o Humphrey Tonkin, antaŭa prezidanto de TEJO kaj dekano de la Universitato de Pensilvanio en Filadelfio; kaj de s-ino Tonkin. Kunlaboris en la unua eldono de la verko s-ro Alvino Fantini, direktoro pri Lingvaj Studoj de la lernejo *School of International Studies, Experiment in International Living*, Brattleboro, Vermont, Usono. La aŭtoro de la verko estas d-ro John L. Lewine, profesoro pri Esperanto en la Universitato de Fort Lauderdale en Florido kaj dum 30 jaroj ĉefinstruisto pri la franca kaj hispana lingvoj en gimnazioj en Novjorko kaj prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto. Ebligis la eldonon de ĉi tiu verko la kunhelpo de s-ro George J. Hecht, prezidanto de *Basic Esperanto Association* (Asocio por Baza Esperanto), Novjorko.

John L. Lewine

RECENZOJ (daŭrigo de p. 53)

tradukoj, plejparte en formoj versteknike pli facilaj ol la originalo, ne legiĝas kiel grandiozaj artverkoj proprarajte. Sed por sia celo, kune kun la originalo sentigi al la leganto la belecon de la originalo, ili sufiĉas.

Tial mi konsentas kore ŝian rekomendon traduki gravajn verkojn de la Esperanta literaturo en naciajn lingvojn (p. 380). Ŝi kiel literaturhistoriisto, malgraŭ eraroj en detaloj, faris sian eblon por diskonigi la Esperantan literaturon ekster la Esperanta movado; nun la tradukistoj faru sian eblon!

Mendu ĉe UEA: 50,— (por Nederlando 52,—) gld. plus sendokostoj 10%.

* 150 gld. (por Nederlando 174 gld.) plus sendokostoj 10%.



58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Beograd, 1973 07 28 – 08 04.

Alta Protektanto: Prezidanto de Jugoslavio, Josip Broz Tito

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝkotizoj ĝis la 31a de marto 1973: gld.

1. Kongresano ne membro individua de UEA 99, –
2. Kongresano indiv. membro kun Jarlibro (MJ) 84, –
3. Kongresano indiv. membro (MA) 69, –
4. Edz(in)o de kongresano en kateg. 1 69,30
5. Edz(in)o de kongresano en kateg. 2 aŭ 3 57,75
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara 29,70
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara 49,50
8. Blindulo 39,60

Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko

Kiel temon de la Dua Ĝenerala Kunveno kaj kiel ĉeftemon de la 58a UK la estraro de UEA elektis la interesan problemon de "Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko". Oni antaŭvidas en la unua parto de la Kunveno aŭdigi koncizan raporton pri la situacio en plurlingvaj ŝtatoj, kun distingo de la diversaj tipoj, en la dua parto oni malfermos ĝeneralan diskuton. La Unua Ĝenerala Kunveno, kiel kutime, pritraktos la raporton de la Estraro 1972/73.

Elstaraj patronoj

Ĝis la finredakto de tiu ĉi komuniko la LKK anoncis aliĝon de 17 eminentaj jugoslaviaj personecoj al la Honora Komitato de la 58a UK. Inter ili estas la ĉefministro Džemal Bijedić, la prezidanto de la Socialista Unuiĝo Veljko Milatović, la ĉefurbestro de Beograd Branko Pešić kaj aliaj elstaruloj de la jugoslaviaj politika, kultura kaj scienca kampoj.

Primovada debato

Por la populara kongresa programero "Debato" estas elektita ĉi-jare primovada temo: "Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj?". Sendube troviĝas defendantoj de *kaj* pozitiva *kaj* negativa respondo al tiu ĉi demando. Kiu estos pli multaj...?

Por junaj oratoroj

Monpremioj de 40 ĝis 100 guldenoj atendas junajn oratorojn en la ĉi-jara Oratora Konkurso, kies temoj viciĝas jene:

1. Kion celas la hodiaŭa junularo?
2. Ĉu povas ekzisti internacia kulturo?
3. Lingvoj kiel portantoj de kulturaj valoroj.
4. La studentaro kaj la ĝenerala publiko.

Antaŭkongreso en Ljubljana

La Esperanta Societo en Ljubljana, interkonsente kun la LKK, organizas de la 24a ĝis la 27a de julio 1973 3-tagan programon kun ebleco de posta komuna vojaĝo al Beograd. Detaloj aperas en la Dua Oficiala Bulteno.



La ĉefa salonego de la kongresejo ("Dom sindikata") provizos indan kadron por diversaj kongresaj laboroj kaj kulturaj kaj festaj aranĝoj.

Infanoj helpataj

Dank'al speciala fondaĵo de la Universala Kongreso nomata "Adoptaj Gepatroj", la LKK povas inviti al senpaga partopreno en la 13a Internacia Infankongreso en Beograd ankaŭ difinitan nombron da infanoj el la landoj kun transpagaj problemoj. Kondiĉo por la partopreno estas bona lingvoscio de Esperanto kaj aĝo inter 6 kaj 13 jaroj. Detaloj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso.

Fakaj kunvenoj en Beograd

Jam pli ol dudeko da fakaj organizaĵoj kaj asocioj mendis sian specialan kunvenejon dum la kongreso. Ĉu ankaŭ la via? Atentu: kiu volas trovi informon pri sia faka kunveno en la kongresa libro, devas fari la mendon antaŭ 1973-03-31.

Novaj karavanoj anoncitaj

Al la jam pli frue anoncitaj grupvojaĝoj en Britujo, Francujo, Nederlando kaj Usono aldoniĝis lastatempe "kongresvojaĝo" de C.D.E.L. (Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando); de J.E.I. (Hongo 2-2-14, Bunkyō-ku, 113 Tokio, Japanujo); de H.E.F. (f-in-o I. Gastón, Po. M. Moreno 35/4ª dcha, Zaragoza, Hispanujo); kaj de Fondumo Esperanto (Esperanto-tie 4, SF-02220 Iirislahti, Finnlando).

Alloga programo en Ateno

La Postkongresa komitato en Ateno (Grekujo) preparis riĉan kulture-turisman programon de la Oficiala Postkongreso 1973. La partoprenantoj ĝuos konatiĝon kun la monumentaj verkoj de la antikva greka civilizo, renkontotaj precipe dum la ekskursoj, fakaj prelegoj kaj teatraj prezentadoj. Plenaj detaloj aperas en la Dua Oficiala Bulteno.

Statistiko (je 1973-02-28)

Argentino 1, Aŭstralio 7, Aŭstrujo 16, Belgujo 27, Brazilo 3, Britujo 71, Bulgarujo 23, Ĉeĥoslovakio 4, Danlando 11, Egiptujo 2, Finnlando 28, Francujo 120, FR Germanujo 66, Grekujo 3, Hindujo 1, Hispanujo 31, Hungarujo 8, Islando 2, Israelo 4, Italujo 61, Japanujo 29, Jugoslavio 88, Kanado 16, Koreujo 5, Meksiko 3, Nederlando 69, Norvegujo 10, Nov-Zelando 3, Pollando 16, Portugalujo 4, Rumanujo 2, Sovetunio 9, Svedujo 43, Svisujo 10, Turkujo 1, Usono 82, Venezuelo 1.

Entute 880 aliĝintoj el 37 landoj.



La 16a IS: festantoj

FINO BONA – ĈIO BONA – pri la 16a IS de GEJ

“Bonege” komenciĝis jarfina Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, ĉifoje okazanta en Darmstadt: kvankam estis atenditaj nur ĉirkaŭ 60 partoprenantoj, venis entute 84 el 16 landoj, el kiuj ĉirkaŭ 70 konstante ĉeestis la seminarion, la aliaj venis nur vizite, por po unu aŭ du tagoj. Ĉiukaze tiuj ciferoj montros al amikoj, kiuj ĉeestis la lastajn Internaciajn Seminariojn de GEJ, kiomgrade konstante refortiĝas la sekcio. Ĉeestis granda aro da anoj por la unua fojo. Pro ĉeesto de tiom da komencantoj sufiĉe bone funkciis la diskutgrupo de komencantoj sub gvido de W. Schumacher kaj konsiderindas ĝia tradiciigo; alian eksperimenton sukcesan prezentis la “grupdinamikanoj” H. Tautorat kaj K.E. Salzmann, kiuj sukcesis malkovri grupajn kaj psikologiajn streĉojn kaj malstreĉojn de la grupanoj kaj vekis ĉe kelkaj partoprenantoj intereson pri psikologiaj kaj grupdinamikaj metodoj kaj rimedoj.

Tute alispecaj estis la iom ĝemelaj – laŭ intenco – laborgrupoj pri reklamado (T. Oberndorfer) kaj verkado de informilo (P. Peeraerts), kiuj ambaŭ modernstile kaj praktike laboris kaj fine de la seminario prezentis praktikajn proponojn, kion fari rilate la traktitajn kampojn.

Grandajn sukcesojn ankaŭ ĝuis la gripo, kiu kunseminariis kaj sukcesis kapti sufiĉe grandan viktimumon, i.a. ankaŭ la ĉefon de unu el plej manipulivaj laborgrupoj: J. Pool el Usono, kiu tamen, helpe de siaj kunlaborantoj kaj komparante kun naciaj statistikoj pri kulturaj atingoj kaj opinioj, sukcesis kompiligi sufiĉe intiman esperantistan statistikon pri la socia sinteno de la ĉeestanta geamikaro, kaj videbliĝis i.a. mirigaj rezultoj: nur unu el la demanditaro nomis sin “religiema”, kontraŭe vasta plimulto deklaris sin “politika ekstremulo”. – Kiu konanto de GEJ kaj ĝia anaro antaŭe supozintus tion?

Kvankam ni ne povas pritrakti ĉiujn laborgrupojn, ni menciuj almenaŭ tiujn de C. Nourmont pri psikologiaj testoj kaj de H. Bakker pri minoritatoj.

Certe ni devus ankoraŭ ion diri pri la gaja kaj amikeca etoso, kiu regis, kaj se oni estus nominta gvidanton por grupo pri produktado de agrabla kaj idealisma etoso, tiun titolon meritis nia belga amiko Jo Haazen, konata elstara muzikisto, kiu – laŭ sia fako – ne nur ĉiuvespere klopodis kunigi kaj akordeonludante kantigi la anaron, sed eĉ starigis martelantan agadgrupon por tute fermi la suprajn fenestrojn de la ĉefa salono, organizis vek- kaj kuirservojn akuratajn, ktp. Do certe kaj sendube li estis la plej grupserva seminariano kaj pro tio meritis laŭdan mencion.

UNUECO IĜU KROMA FORTO

Kiel kutime ankaŭ ĉijare dum la IS okazis la jara membrar-kunveno de GEJ, kie oni elektas la funkciulojn, difinas la agadojn kaj priparolas la projektojn. Ĉifoje fakte raportendas nur agrablaĵoj, t.e. pozitivaj ŝanĝoj laŭdindaj; ĝenerale ni menciuj nur eksteran fakton, ke entute nur dum la elektoj estis unu sola hazarda “ne”-a vojo, sed ĉiuj aliaj decidoj kaj elektoj estis unuanime akceptitaj aŭ aprobitaj; al la ĝis nun nur trikapa estraro sub gvido de H. Klünder aldoniĝis tri novaj anoj, – amikoj, kies agado vere pravigas ilian nomiĝon, i.a. la nova sekretario de GEJ, H. Schicke el Hamburgo, kiu preparos kaj prizorgos la junularajn aranĝojn dum la UK '74 en Hamburgo; la ĝisnunajn TEJO-komitatanojn H. Klünder kaj I. Maier anstataŭas nun du aliaj: U. Brandenburg kaj G.D. Winkler, kiuj, krom ĝenerale reprezenti GEJ-n, okupiĝos ankaŭ pri preparoj por la IJK '74, kiu ja okazos en F.R. Germanujo. Resume oni povas konстати, ke GEJ vige daŭrigas sian vojon al plifortigo de la junulara movado en sia lando, kaj ke sub la signo de tiu nova unika unuanimeco oni faros pluajn grandajn paŝojn antaŭen.

Diversaj aranĝoj atendas vin. Interesitojn informos la GEJ-estrarano pri aranĝoj: F. Kruse, DJH, D-2171 Wingst, FRG.

* * * * *

Krom aro da enlandaj aranĝoj antaŭvideblas du semajnfinaj aranĝoj kun nederlandanoj kaj unu kun danoj, komunmerkata junulararanĝo en Luksemburgo kaj krome du paskaj jene:

1) aŭstruja: de la 17a ĝis la 24a de aprilo en Salzburgo kaj la landlima regiono germana, Berchtesgaden; la temo estos “Laboro en kaj per amasmedioj”, i.a. estos vizito al regiona televido kaj la ĉefa ĵurnalejo; detalajn informojn donos T. Oberndorfer, Ferdinand-Wiesinger-Str. 15, A-4600 Wels, Aŭstrujo.


2) “p k s”, Paska Kultura Semajno: de la 18a ĝis la 25a de aprilo en la franca kulturdomo, Kastelo Grésillon, okazos la tradicia Paska Kultura Semajno de JEFO – franca sekcio de TEJO; la ĉijara temo estos “kunvivado”, kaj prezentiĝos kursoj, paroladoj, distraĵoj; tiu, kiu ŝatas havi pli detalajn informojn pri tiu partopreninda aranĝo, petu la interesan informbultenon ĉe: D. Despiney, 43 Quay de la Champagne, F-94170 Le Perreux-sur-Marne, Francujo.

REGIONA AGADO DE T.E.J.O.

Konstato pri manko de efektiva tutmondeco al nia Tutmonda Organizo kaj pri ia eŭropeco de nia Lingvo “Internacia” instigis la Estraron de TEJO, antaŭ kelkaj jaroj, al starigo de speciala fako: la Regiona Agado. Ĝia ĉefa celo estas ekspluato, pere de lokaj aktivuloj, de ĉiuj kondiĉoj kaj cirkonstancoj por varbi homojn al Esperanto kaj, poste, por organizi Landajn Sekciojn de TEJO. Ĝi, malgraŭ la multaj rimedoj, ĉe kelkaj kazoj jam sukcesis (ekz-e SEMED, korespondaj kursoj en Afriko).

Tamen, por ke ĝi povu helpi ne nur morale la lokajn agemulojn, kiuj bezonas eĉ bazan materialon, ni kontribuu ioman sumon al la ĵus starigita “Tutmondiga Fonduso” (itala poŝtakonto: Roma 1/20718 de Nino Vessella, via Panniglia 54, I-03030 Roccasecca).

TEJO-redaktoro
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-
Sterkrade,
F. R. Germanujo



Fekunda tereno – la skoltaro

Dum la someraj monatoj de 1972 membroj de Skolta Esperanto-Ligo (SEL) aktivis interalie en tri grandaj skoltaj tendaroj, kie entute 13 000 skoltoj partoprenis.

Speciale en la malplej granda tendaro en Nederlando, kie 1 000 skoltoj ĉeestis, la intereso estis tre granda: 5% aĉetis lernolibron.

Oni povas sin demandi, kiel la relative granda nombro ekestis. Kompreneble la malgrandeco de la tendaro ebligis intensivan prilaboron, kaj la alloga prezentado de la speciala skolta libro *Ĵamborea lingvo* persvadis multajn skoltojn al aĉeto. Sed tre interesa estis la sperto, ke multaj interesiĝis pri la Internacia Lingvo pro la preparlaboroj de aliaj esperantistoj dum aliaj skoltaj kunvenoj.

Ofte okazis, ke nia budo ricevis vizitojn de personoj, kiuj deziris pliajn informojn kaj kiuj volis paroli kun ni pri Esperanto. Dum la kontakto ni povis konstati, ke tio estis ne nur pro nia propra laboro. La fakto, ke oni por la dua aŭ tria fojo, ofte en diversaj landoj, denove renkontiĝis kun la Internacia Lingvo, donis al ili valoran impreson pri la internacieco kaj utilo de nia lingvo.

Ni opinias, ke ĉiu esperantisto sciu pri tio. Tro ofte oni laboras por disvastigi la lingvon kaj jam baldaŭ konkludas, ke la laboro estis vana.

Tro frue oni tial ĉesas agadi, perdas la kuraĝon! La konkludo tamen estas ne nur erara, ĝi eĉ estas danĝera. Kiam la homoj por la unua fojo aŭdas nin, ili kompreneble unue volas pripensi la aferon, taksu kiom ĝi valoras — kaj por tio oni bezonas tempon. Oni emas eĉ kaŝi la interesiĝon por eviti la persistan altrudon de tro entuziasmaj "propagandistoj".

SEL tial petas, ke ĉiu kunlaboranto en nia agado daŭrigu la klopodojn ĝis post la ĵamboreo en Norvegujo en 1975, kiu estos la fina punkto de la nuna kampanjo. Sed ankaŭ aliaj esperantistoj, kiuj laboras sur aliaj terenoj, utiligu ĉi tiujn lernigajn spertojn.

Valoras ankaŭ mencii alian sperton de la SEL-anoj dum la tri tendaroj. La nombro de skoltoj, kiuj neniam ajn aŭdis pri Esperanto, estis mirige granda!

Feliĉe antaŭ la ĵamboreo en Norvegujo ankoraŭ restas du plenaj jaroj por plibonigi tion!

J.K. Hammer



Ekzempla enketo

Dum la pasintjara Itala Nacia Kongreso de Esperanto (1972-09-16 ĝis -23) en Pisa, Itala Esperantista Junularo organizis enketon surstratan kunlabore kun la Konsilio de Itala Esperanto-Federacio. La ĉefa celo de la enketo estis esplori la realan efikon de kontakto kun la publiko laŭ tiu metodo.

La enketlaboro estis farita en unu tago jene: Post mallonga klarigo pri la intervjumetodo, 23 junaj eksperimentantoj dividiĝis en grupojn de po 2-3 personoj kaj plenumis la intervjuadon en la urbo-centro de Pisa kaj poste en Viareggio.

Entute 558 personoj estis intervjuitaj por 3 demandoj: 1) Kio estas Esperanto? 2) Kion vi opinias pri la ideo de tia internacia lingvo? 3) Ĉu vi konsentas pri samtempa enkonduko en diversaj landoj de Esperanto en la lernejojn kiel lernobjekto?

Rezultiĝis, ke 33% de la intervjuitoj en Pisa kaj 50% de tiuj en Viareggio ne sciis eĉ supraĵe, kio estas Esperanto.

La intervjuitoj ricevis karton, adresitan al Itala Esperanto-Federacio kaj sendeban por ricevi informojn pri Esperanto.

La kostojn por preso de la enketiloj kaj de la kartoj pagis la magistrato en Pisa.

Itala Esperantista-Junularo intencas organizi similan laboron ankaŭ ĉi-jare en pluraj aliaj urboj.

Renkontiĝo por infanoj

En la daŭro de la 6a Pupteatra Festivalo okazonta de 1973-10-01 ĝis -7 en Zagreb (Jugoslavio) okazos ankaŭ la 2a Internacia Infana Renkontiĝo kun tre varia kaj interesa programo: observado de 10 pup-teatraj prezentaĵoj en Esperanto; ekskursoj; kultur-amuzaj programoj en lernejoj de Zagreb; sportaj konkursoj; partopreno en Internacia Infana Ĵurio ĉe PIF.

La organizantoj Internacia Kultura Servo (adreso: Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb) invitas ĉiujn lerne-jajn grupojn plani vizitojn al tiu ĉi renkontiĝo surbaze de interŝanĝo. Eksterzagrebaj grupoj loĝos en la hejmoj de zagrebaj infanoj, kiuj lernas Esperanton en tri zagrebaj elementaj lernejoj, kaj devigos sin gastigi siajn zagrebajn gekolegojn en konvena tempo dum 7 tagoj. Do, tia vizito necesigas sole la vojaĝelspezojn. Anoncu vin tuj, por ke la infanoj povu komenci interkorespondi. Preferata aĝo estas 9-13 jaroj.

Gepatroj, kiuj dezirus veni al Zagreb kun siaj infanoj, povas loĝi laŭdezire ankaŭ en hoteloj. Internacia Kultura Servo prizorgos la rezervigojn. Hotelaj pensionoj en Zagreb prezentas prezojn por persono ekde kvin dolaroj tage. Ĉiujn pliajn detalojn petu tuj de

Internacia Kultura Servo

LA SUFIKSO "ER-" EN ESPERANTO

(Sendis al ni sinjoro J. Chvosta, Ĉeĥoslovakujo, al kiu ni kore dankas.)

Dialogo inter patro kaj filo.

P: Malfeliĉa knabo, kial vi revenas tiel malfrue el la lernejo? La tagmanĝo jam estas malvarma.

F: Sed, paĉjo, ne gravas, mi ne volas tagmanĝi, mi jam manĝis ĉeneron.

P: Kion vi manĝis? Tio ja estas tute nemanĝebla. Tiel malmola!

F: Nepre ne, ĝi estis mola kaj bongusta manĝo. Al mi ĝi tre plaĉis.

P: Nekredeble, sed nun vi sentas dolorojn en la stomako, ĉu ne?

F: Tute ne, mi ripetas, mi formanĝis ĉion kun apetito.

P: Sed vi manĝis ĉeneron!

F: Nu, kio estas? Onklo Neron ja kuiras tre bone.

P: Malfeliĉa filo, kial vi ne diris, ke vi manĝis ĉe onklo Neron? Mi jam opiniis

F: Sed paĉjo, mi senĉese diras, ke mi jam manĝis ĉe Neron kaj vi asertas, ke tio ne estas bona kaj ke min doloras la stomako.

P: Bone, bone, ni lasu la aferon. Sed diru, kion vi lernis en la lernejo hodiaŭ?

F: La instruisto klarigis al ni la sencon de la sufikso "er-".

P: Kaj ĉu vi konas tion bone?

F: Certe, tio ja estas parto de ia tuto. La instruisto mem donis kelkajn ekzemplojn: neĝo — neĝero, akvo — akvero, pano — panero. Kaj mi sciis: pluvo — pluvero.

P: Bone, sed morgaŭ la instruisto ekzamenos, do estas bone, se vi konos eĉ aliajn ekzemplojn. Eble . . . eto — etero . . .

F: Jes. Anso — ansero, papo — papero, veto — vetero, kulo — kulero, kvako — kvakero, Numo — numero, kolo — kolero, lito — litero . . .

P: Mi vidas, ke vi ĉion bone elpensis. Nepre vi morgaŭ sukcesos, se la instruisto ekzamenos vin kaj vi nomos tiujn ĉi ekzemplojn laŭ mia modelo.

EL LA 10 DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

La naŭa devo el nia esperantista *devaro* fakte entenas tri gravajn devojn, 1) legi por resti informita, 2) aboni gazeto(j)n por ebligi al la eldonanto(j) daŭrigi *sian* poresperantan laboron, kaj 3) kunlabori, se vi kapablas, per interesaj kontribuajtoj.

Ne ĉiuj esperantistoj havas sufiĉe da tempo aŭ la kapablecon verki artikolojn en Esperanto, sed ĉiuj povas — devas — aboni almenaŭ unu bone redaktitan gazeton. Estas doloriga konstato, ke jam *plurfoje* bonegaj gazetoj, *elstaraj* laŭ la enhavo kaj lingvo, devis malaperi pro manko de abonantoj, dum multaj aliaj vivas *je la rando de abismo*.

Pri la amplekso kaj diverseco de la nuntempa gazetaro en Esperanto informas vin detale la jarlibro de U.E.A., Dua Parto.

Klarigoj:

dev-ar-o: la tuto de niaj devoj estas nia "devaro", same kiel la tuto de niaj principoj estas "nia principaro" (Legu: Principaro de Frostavallen, en la "Statuto kaj Regularoj de U.E.A.", 1968, paĝo 58).

sia-n: por eltrovi, kiun posedan pronomon uzi (sia-lia-ilia ktp.), oni analizu la frazon, enkondukante en ĝin la (kaŝitajn) subjektojn. La koncerna frazo tiam tekstus: "Vi abonu gazeton, por ke vi tiel ebligu al la eldonanto(j), ke LI (ILI) daŭrigu SIAN poresperantan laboron." Nun vi konstatas, ke la subjekto de la subfrazo (li-ili) estis kaŝita en la infinitivo "daŭrigi".

plur-foj-e: adverbaj formoj de "pluraj(n) fojoj(n)". Komparu ankaŭ: multfoje, ĉiufroje, kelkfoje, unufoje, ktp.

el-star-a: adjektiva formo de la verbo "el-stari", t.e. stari pli reliefe, pli okulfrappe ol io (iu) alia. Turo de preĝejo elstaras (staras pli alte) en komparo kun la ceteraj domoj ĉirkaŭ ĝi. Nia domo havas elstaran balkonon (= balkono, kiu elstaras, staras pli reliefe). En figura senco la vorto signifas: eminenta, bonega, distinginda. Dirante, ke iu gazeto estas elstara laŭ enhavo kaj lingvo, oni intencas komprenigi, ke la gazeto distingas sin (kompare kun aliaj) per sia enhavo kaj per sia perfekta lingvo.

je la rando de abismo: estas klare, ke temas tie ĉi pri figura senco (t.e. ne la senco laŭ la vortoj). Se oni vivas je la rando de abismo, oni estas en tre danĝera situacio, ĉar je iu ajn momento, oni ja povas fali en ĝin kaj pereii.

cir-it-a: ciri = brili, purigi, ĝis la objekto brilas; ŝu-ciristoj = ŝu-purigistoj.



Ĉi tiu artikolo aperis en la 58-a numero de la gazeto "Esperanto", marto 1973, paĝoj 14-15.

NOVA ĈEFDELEGITO POR FINNLANDO

Esperanto-Asocio de Finnlando nomis, konforme al la art. 14 de la Ĝenerala Regularo de UEA, novan ĉefdelegiton de UEA ekde la 18a de februaro 1973. Li estas s-ro Harri Laine, Tornihaukant. 8 A 19, SF-02620 Karakallio. La individuaj membroj de UEA en Finnlando estas petataj de nun direkti siajn kotiz-pagojn al s-ro Laine.

Samtempe ni esprimas sinceran dankon al la ĝisnuna ĉefdelegito, s-ro J. Jäntti, pro lia bona kunlaboro.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Baxter, Russell W., Manly, Aŭstralio.
Fors, Tore, Kävlinge, Svedujo.
Harry, R.L., Bonn, F.R. Germanujo.
Isobe, Akira, Rotterdam, Nederlando.
Lindros, Herbert, Ljungby, Svedujo.
Sachs, F.H., Leiden, Nederlando.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-05-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Joyce Turner, FD Rockhampton. **Brazilo:** Wallace Amery, FD Bauru; Artur A. Massular, FD Resende. **Ĉilio:** Julie Brinkman, D Valdivia. **Francujo:** Claude Trésorier, FD Besançon; Jean-Louis Texier, D Cerny; Jeanne Gilles, VD kaj FD Crest; Michel Campan, FD Saint-Mandé; Clément E. Motillon, FD Tours; Marcel Colleu, FD Vire. **F.R. Germanujo:** Harald Schicke, JD Hamburg; Artur Bormann, D Reinbek. **Hungarujo:** Ervin Fenyvesi, FD Budapest; Ludoviko Niederfriniger, FD Budapest; Sándor Jakab, FD Budapest; Antal Barasevich, FD Csákyberény; Eliza Takács, D kaj FD Csorna; Sarolta Sudár, D kaj FD Szekszárd. **Italujo:** Elena Lazzini, JD Marina di Massa; Egisto Borghini, JD Massa; Renato Bisi, D Trieste. **Jugoslavio:** Svetozar Tomič, D Visoko. **Kolombio:** Lope H. Ortégón, D Bogotá. **Kubo:** Oscar Otero Fernandez, FD La Habana. **Luksemburgo:** Marcel Ries, D Dudelange. **Nederlando:** R.W.J. Hubers van Assenraad, FD Den Haag; Edwin Burg, FD Den Haag; Sijfke G. Musch, D kaj FD 't Waar. **Portoriko:** Hugo Rodríguez-Ramírez, D kaj FD San Juan. **Rumanujo:** Gábor Lázár, FD Covasna. **Soveta Unio:** Edmund Jaan, D kaj FD Abja Paluoja. **Svisujo:** Hans Kästli, FD Wil. **Usono:** Germaine Chomette, D Los Angeles; Mary-C. Sears, D Portola Valley kaj FD en San Francisco; Robert Bailey, D Redwood City kaj FD en San Francisco.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972 — pro adresŝanĝoj kaj aliaj kaŭzoj)

Belgujo: Ganshoren (D). **Britujo:** Blackpool (FD), Bristol (VD kaj FD naturprotektado: kontraŭvivisekcio), Dagenham, Exeter (VD kaj FD sonbendigo ama-

tora). **Ĉeĥoslovakujo:** Litomyšl. **Danlando:** Aalborg, Haslev, Kolding (FD junulargastejoj), Lyngby (FD vegetaranismo). **Filipinoj:** Quezon City. **F.R. Germanujo:** Nordhorn. **Hispanujo:** Badalona, Zaragoza (FD edukado). **Kanado:** Quebec, Roxboro, Saint-Sulpice. **Nederlando:** Dordrecht, Dubbeldam, Papendrecht, Venray. **Polujo:** Nowy Sącz (FD lingvistiko), Szczecin (D kaj FD), Toruń (VD), Warszawa (JD). **Soveta Unio:** Abja-Paluoja. **Svedujo:** Malmberget, Norrköping (D kaj FD SOS-aŭtoservo). **Urugvajo:** Montevideo.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

58 H. Zeller, Aŭstrujo. 59 A. de Souza Barbosa, 60 C.A. Cunha, 61 C. Domingues, 62 A. Flores, 63 L. Goldenzweig, 64 G. Pádua, 65 F.N. de V. Pessoa, 66 J.D. Pinto, 67 C. Rezende, 68 D. Lima Verde, Brazilo. 69 P. Schilperoord, Britujo. 70 K. Mikkelsen, 71 R. Olsen, Danlando. 72 M.T. Boiton, 73 R. Jossinet, 74 G. Larglantier, Francujo. 75 J. Grundhoff, 76 F. Teltz, FR Germanujo. 77 A.E. de Salamanca, Hispanujo. 78 H. Waksman, Israelo. 79 A.A. Laverman, 80 J.L. Muller, Nederlando. 81 E. Maarli, Norvegujo. 82 B. Andersson, 83 R. Emson, 84 E. Johansson, 85 B. Lindeberg, 86 E. Lindberg, 87 F. Pettersson, 88 H. Rydberg, 89 R. Svärd, 90 L. Tell, Svedujo. 91 H. Boffejon, Svislando. 92 R.H. Beard, 93 F.J. Belinfante, 94 G.W. Chamberlin, 95 A. Correa, 96 G. Fellner, 97 M.W. Ham, 98 F.A. Holmes, 99 R. Jaderstrom, 100 W.A. Knox, 101 J.K. Lesh, 102 E.W. Lowe, 103 R. Oehler, 104 J. Parker-son, 105 G. Sardina, 106 H. Tonkin, 107 W. Williams, Usono.

DONACOJ 1972

Patronaj membroj A de TEJO 1972: 32 Motala Esperanto-Klubo, Svedujo.

DONACOJ 1973 (Gld.)

Fondaĵo Azio-Afriko: Belgujo: G. Pirlot, 14,92. Nederlando: R. Moerbeek, 100,—. Sumo ĝisnuna: 114,92.

Fondaĵo Canuto: Britujo: I. Lapenna, 90,—. F.R. Germanujo: F. Liebl, 30,—; memore al s-ino Hertha Wilke, 50,—. Islando: K. Sigurdsson, 7,90. Nederlando: F.H. Kat, 30,—; J.L. Muller, 10,—. Svedujo: C. Aldsten, 9,51; Erik Brenander, 29,20. Sumo ĝisnuna: 256,61.

Ĝenerala kaso: F.R. Germanujo: G. Becker, 154,01; W. Klünder, 22,08; s-ino E. Kruse, 21,28. Nederlando: M. Meywes, 16,—; H. Wernik, 10,—. Svislando: W. Kolbelt, 1,09. Du anonimuloj, 10,— kaj 2,—. Sumo ĝisnuna: 241,85.

Patronaj membroj A de TEJO 1973: 1 f-ino E.L. Parson, Britujo. 2 P.V. Bagger, Danlando. 3 G. Becker, 4 W. Klünder, 5 U.J. Moritz, F.R. Germanujo. 6 s-ino L. Terrazzani, Italujo. 7 J. Derks, Monako. 8 M. Meywes, 9 R. Moerbeek. 10 H.M. Schippers, Nederlando. 11 P. Almén, 12 R. Nordström, Svedujo. **Propaganda konto:** Hispanujo: A. Criach, 15,32. Sumo ĝisnuna 15,32.

TEJO: Kanado: s-ino B. Salt, 400,—. Nederlando: s-ino A.M. Slot, 75,—. Sumo ĝisnuna: 475,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
Universala Esperanto-Asocio



ANON- CETOJ

TARIFO:

Ĉiu vorto kostas 0,50 gld.
(t.e. 1 internacia respond-
kupono). Pri la enhavo de
la anonc(et)oj respondecas
sole nur la anoncantoj.

16-jara lernanto
Syt. Maciulevičius
(Aviniškio km.,
Kuktišdių p.,
Utenos raj.,
Litova SSR,
Soveta Unio)
deziras korespondi
tutmonde kaj
interŝanĝi
bildkartojn kaj
poŝtmarkojn.

Preparu vin por la 58-a en Beogrado! Informiĝu kaj konatiĝu antaŭ via vojaĝo pri popoloj, lingvoj, klimato, turismo ktp. de la kongresaj lando kaj urbo. Studu praktikajn konsilojn kaj ekzercojn utilajn por ĉiu kongresanto. Mendu la kajeron "Preparu vin por la 58-a", pagante 5,00 skr aŭ 5 rpk al Inter — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60 -7. Csaba Bodó (H-2750 Nagykörös, I. Ceglédiu 14, Hungarujo), 11-jara, kolektas kalendar-kartojn. Rekompencas bildkarte/poŝtmarke.

Invalida samideano petas alsendon de poŝtkartoj, leteroj filatelie. Interŝanĝo de poŝtmarkoj. Respondo garantiita. H. Hoogland, Zwaluwenlaan 377, Vlaardingen, Nederlando.

"Aktiveco de la monato" estas la nova, premgrupa agado, kiu post nur kelkaj monatoj jam kolektis celkonsciajn kunlaborantojn en 24 landoj. Ĉu ankaŭ vi deziras envicigi vin en tiun ĉi gravan laboron por Esperanto? Se jes, bv. skribi al Inter-grupo, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio.

Tutmondaj infanoj: La Urbestaro kaj Centro de Esperanto Santa Coloma de Gramanet invitas vin partopreni la Duan Internacian Ekspozicion-Konkurson de pentraĵoj. La temo estas libera kaj laŭ akvarela sistemo. Aĝo de 6 ĝis 14 jaroj. Minimuma grandeco de la verkoj, 25 x 35 centimetroj. Limdato la 10a de aprilo 1973. Sendoj al Ayuntamiento de Santa Coloma de Gramanet — Ponencia de Cultura — Santa Coloma de Gramanet (Barcelona) — Hispanujo.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

La dolĉa Franclando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr. fr. afr. aŭ: 38 fr. fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Facile atingebla de Eŭropo estas la apudmara, sudangluja feriejo Hastings, Sussex, kie en bona, komforta gastdomo "Croft House", The Croft, esperantistoj ĉiujare libertempas.

"Univox" — praktikaj kursoj en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj — troviĝas sur diskoj (tonkartoj) aŭ kase-

TIU ĈI NUMERO

estas la lasta, kiun vi ricevas, se vi ankoraŭ ne pagis por la abono en 1973.

Se vi ankoraŭ ne reabonis, bonvolu tuj sendi la abonkotizon (vd. en la dua kovrila paĝo de ĉi tiu revuo) al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando, poŝta ĝirkonto 378964, aŭ al unu el la landaj kotizperantoj de UEA.

toj C-60. (Kasetoj nun riceveblaj ankaŭ por aliaj lingvoj ol Esperanto!) Paralelaj tekstoj ebligas 506 kombinaĵojn. Ordinara sonbendo, 9,5 cm/sek., nur en Esperanto. Petu informojn: INTER-grupo, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Telefono: (031) 48 95 97.

Filatelistoj! UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trioj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Luis Vicino, C.C. 2272 CC, Buenos Aires, Argentino, serĉas kopiojn de famaj pentraĵoj, ofertas p.m. neuzitajn aŭ kovertojn U.T. argentinajn.

Radio-bulteno n-ro 4 estas preta. Artikoloj pri Esperanto en Radio, televiziaj satelitoj, konsiloj kaj sugestoj. Prezo (inkluzive jaran kotizon kaj 20 poŝtkartojn) 5,20 skr aŭ 6 rpk. Inter — Societo por la Internacia Lingvo en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60-7.

Finna esperantisto vojaĝos en Eŭropo kaj volas konatiĝi kun junaj fraŭlinoj. Bv. kontakti s-ron Pentti Rahanen, Nordenskiöldink. 8A 14, SF-00250 Helsinko 25.


Jam en cent landoj esperantistoj ricevis senpagan evangelian kristanan literaturon. Petu ankaŭ vi ĉe Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Por fine venki kaj tiel certigi al la esperantistaro ankoraŭ unu konstantan programon en la Internacia Lingvo, vi estas insiste petata skribi al Radio de Svedio. Ĝuste nun grava reorganizado de la programa agado kaj samtempa funkciigo de novaj, fortaj sendiloj povas favori al Esperanto, kondiĉe ke vi skribas kaj petas programojn. Skribu nun al la nova direktoro de la koncerna fako, referencante al Inter — Agadgrupo por Esperanto. Jen lia adreso: S-ro Bengt Gustafsson, Dir. de Progr. por eksterlando, S-105 10 Stokholmo, Svedio.

Sinikka Mättö, Porvoonkatu 5 A 24, SF-00510 Helsinki, Finnlando, deziras korespondi kun filatelistoj.

Korespondant(in)ojn serĉas por siaj ĉiuaĝaj diversregionaj lernant(in)oj: s-ro Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Ne respondos sed transdonos la petojn. Indiku aĝon, profesion ktp.

internacia lingvo




NUN ANKAŬ EN LA FORMATO A3!

La konata internacia afiŝo de UEA, kvarkolora desegnaĵo de Tadeusz Moskala, aperis nun ankaŭ en la oportuna norma formato A3 (420x297 mm), kaj kostas nur 0,25 gld. (por nederlando 0,29), plus sendokostoj 10%. Minimuma mendo: 10 ekzempleroj. Libroservo de UEA.

internacia esperanto-afişo nederl. 0,29 gld. 175 rotterdam-3092 nederlando

Amikeco trans limoj

Foto-poŝtkartoj por la Semajno de Internacia Amikeco kaj aliaj okazoj. Eld. UEA. 2,50 gld. (por Nederlando 2,90 gld.) por 10 ekzempleroj. Sendokostoj 10 procent.



KOMPOSTO-LABOROJ?

La Centra Oficejo de UEA akceptas mendojn por kompostado IBM por ofseta preso. Petu oferton, informante pri amplekso, litertipo kaj litergrandeco, kompost-maniero ktp.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22. – 29. de julio) en La internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti – kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
Dk-8230 Åbyhøj, Danlando.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,-- gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,- gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



La Monda Lingvo-Problemo

*Socia-Lingvistika-Politika-Jura
Psikologia-Ekonomika*

Vol. 4 (1972) N-ro 11

Alfred E. OPUBOR, Language and the communication of power

Michael ZEILINGER, Können Computer das Sprachproblem lösen?

Théodore GUTMANS, Esperanto and Icelandic: Two contrasting lexical systems

P.H. van der PLANCK, The linguistic assimilation of language minorities in Europe

B.D. EMMART, Attitudes towards the world language problem as shown by "Q-methodology"

Valter TAULI, Can language be planned? (recenzo)
Plus ampleksaj resumoj en Esperanto

Eldono de Mouton sub aŭspicio de CED

Mendu per UEA

Jarabono (3 x 64 p.) kostas 25,– gld.

Ankoraŭ haveblaj: vol. 1 (1969), n-roj 1-3; vol. 2 (1970), n-roj 4-6; vol. 3 (1971), n-roj 7-9.

Nun aperanta: vol. 4 (1972), n-roj 10-12.

Jam akceptataj estas la abonoj ankaŭ por vol. 5 (1973), n-roj 13-15, kaj por la postaj volumoj.

Disko-kurso por komencantoj

Kvar longedaŭraj diskoj kun kompletaj tekstoj en akompana lernolibro. Allogaj, amuzaj kaj instruaj dialogoj el la ĉiutaga vivo. La voĉoj estas tiuj de la konataj geparolistoj de Pola Radio. Verkis la kurson Andrzej Pettyn, aŭtoro de pluraj lernolibroj naciaj kaj internaciaj.

Disko: 4 diskoj en apartaj kovertoj, 33 t/m., 25 cm Ø, duflankaj, monofonaj.
Lernolibro: dulingva (Esperanta kaj pola), 21 cm. alta, ilustrita, 317 p.
Jam la dua eldono!



Ĉi tiu elstara kurso estas uzebla en ĉiuj landoj por lernantoj, kiuj jam studas la gramatikon de la lingvo sed bezonas ekzercadon en la elparolo kaj konversacio. La diskoj enhavas sole nur esperantlingvan parolon, dum ĉiuj parolitaj tekstoj troviĝas en Esperanto en la akompana pollingva lernolibro. Por la internacia uzo, la diskoj ne formas en si mem sendependan kurson, sed estu rigardataj kiel ekzercma materialo. La kompleto el kvar diskoj kaj akompana libro estas nun mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Prezoj: por Nederlando 51,62 gld.; por ĉiuj aliaj landoj 44,50 gld. Al tiuj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Krome, kiu deziras sendon per registrita poŝto, bonvolu aldoni 1,75 gld.

Ĉu vi parolas Esperante?